

Turka Stelo



SALUTON,

Kun ĉi-tiu marta numero de Turka Stelo preskaŭ unu triono de la jaro 2022 de nia revuo finiĝos. Tempo flugas. Ankoraŭ ekzistas la problemo de kovim sur la mondo sed komenciĝis milito inter Ukrainio kaj Rusio kaj ni emas forgesi la viruson. Kompreneble la kialoj de la milito estas ekster la gamo de ĉi-tiu revuo sed milito estas tute ne dezirinda afero.

En ĉi tiu revuo estas diversaj tekstoj kaj ĉiu certe trovos ion allogan por si.

Ni alproksimiĝas al la fino de la serio pri la greka mitologio de Spiros Sarafian kaj ni dankas al li pro tio.

Nia amiko Konuralp sukcese daŭrigas sian serion pri kinoarto kaj nun li komenciĝis verki duan fantazian serion pri la historio de Vordonisi.

Niaj amikoj el Litovio, Laimundas Abromas daŭrigas sian serion de humuraĵoj, kaj Antanas Vaitkevičius sian ĉapitro post ĉapitro tradukadon de infanlibro

"La Aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj".

Ni dankas al Klaus Friese el Germanio, Valentin Melnikov el Rusio, Vilhelmo Lutermano el Kubo kaj multaj aliaj kiuj afable permesis al ni publikigi siajn verkojn.

Ni dankas ankaŭ al niaj kontribuantoj Roland Platteau el Francio, Bardhyl Selimi el Albanio, Elena Popova el Bulgario, Carmel Mallia el Malto, kiuj daŭre kontribuas al nia revuo kaj ankaŭ al multaj aliaj kies verkoj ne estas en ĉi tiu numero sed ili ofte kontribuas al nia revuo.

Dankon al Ahmed Belmilud el Alĝerio kiu verkis siajn pasintjarajn travivaĵojn dum la fajregoj en Alĝerio, kaj al Liru Chen pri siaj rememoroj pri La 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto.

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Vortludo furoras ankaŭ en Esperanto	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Internacia tago de la gepatra lingvo	4
Tempo Sigelita	5
DIOMEDO (ΔΙΟΜΗΔΗΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
El la literaturaj paĝoj de MAS	10
Triobla Edzo	11
Koncepto de la homo, de la homaro	12
Misteroj - Elpensita aŭ vera? (5)	13
La Polino - parto 5	14
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (11)	15
Birdoj je l'tagiĝo	17
La ultimato	18
Malrapidiĝu!	19
Apokalipso en Kabilio (Alĝerio)	20
VORDONISI: La prao de vivo (2)	22
Ŝercoj	23
Krucvortenigmo	23
Ne juĝu!	24
EKRA2021 - Poezio - Revulo	25
Viro, kiu ne havis tempon	26
Kataj historioj	26
Paŭlĉjo kaj lia azeno	27
Blua	27
Marta ĝojo	27
La 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto	28
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elektebla de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la univiersitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj.
<https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

Vortludo furoras ankaŭ en Esperanto

La reta, anglalingva vortludo Wordle estis publikigita de la usona programisto Josh Wardle en oktobro 2021, kaj vaste populariĝis ekde decembro, kiam estis aldonita la eblo diskonigi la rezulton rete. Nun milionoj da homoj ludas ĝin ĉiutage, kaj afiŝoj pri rezultoj videblas ĉie en sociaj retejoj.


La ĉefa allogaĵo de la ludo estas, ke ĉiuj uzantoj ricevas la saman puzlon en la sama tago, kaj povas kompari siajn rezultojn. La 31-an de januaro oni anoncis, ke la ludo estis aĉetita de la usona gazeto New York Times por "sepcifera sumo", do pli ol miliono da dolaroj. La ludo "provizore" restos senpaga.

Kvankam la originala ludo estas anglalingva, rapide aperis tradukoj en dekoj da lingvoj, inkluzive de Esperanto. Libera Folio parolis kun Enric Pineda, la kreinto de Wordleo, pri la esperantlingva versio de la ludo.

fonto: <https://www.liberafolio.org/2022/02/01/vortludo-furoras-ankau-en-esperanto>



Vortjo.net 30 5/6



WORDLEO 363 3/6

wordleo.cat



#Esperanto

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Rezultoj de la
**73-a Internacia
Esperanto-Sumoo**
de la 9-a ĝis la 23-a de
januaro 2022

1. Partoprenantoj: 344 el 36
landoj+ unu regiono

**2. La suma nombro de
partoprenoj** ekde septembro 2009
ĝis nun 15 699 (2009.9-2021.11)
Efektiva nombro de la
partoprenintoj – ĉirkaŭ 1100

3. Laŭlandaj nombroj : Japanio:
65, Francio: 40, Koreio: 31,
Brazilo: 28, Ĉinio: 24, Pollando:
20, Rusio: 17, Germanio: 17, Italio:
12, Svisujo: 11, ... Turkio: 1, ...

**3. Perfektaj venkintoj (15
venkoj):** 301 el 344 (87.5%)

4. Kvanto de legitaj paĝoj en tiu
ĉi Sumoo: 20000 paĝoj 20 000
paĝoj egalas al 200 libroj, kiuj
havas 100 paĝojn. Unu
partoprenanto averaĝe legis 55,87
paĝoj.

fonto: <http://www.esperanto-sumoo.pl/images/januaro2022.pdf>

Nia retejo:
<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:
<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 1022 (2022-02-20)
**Pri indiĝenaj lingvoj
en Montrealo:
Fettes reĝisoros la
temon de la 107-a**

UK [...]

N-ro 1021 (2022-02-17)
**Noto pri trompo-provoj per
Esperanto: esperantistoj restu
atentaj [...]**

N-ro 1020 (2022-02-14)
**Elektitaj (sen baloto) 4
komitatanoj B de UEA: mandato
2022-2025 [...]**

N-ro 1019 (2022-02-11)
**Mesaĝo de UEA al UN kaj
Unesko okaze de la Internacia
Tago de la Gepatra Lingvo, 21
februaro 2022 [...]**

N-ro 1018 (2022-02-10)
**Duncan Charters salutas la
Vintrajn Olimpikojn en Ĉinio
[...]**

N-ro 1017 (2022-02-07)
**Proponu kontribuojn por la
Scienca Kafejo kaj Kleriga
Lundo de la 107-a UK en
Montrealo 2022 [...]**

N-ro 1016 (2022-02-05)
**Alvoko por la 44-a
Esperantologia Konferenco:
Montrealo, 2022 [...]**

N-ro 1015 (2022-02-04)
Simo Milojević forpasis [...]

N-ro 1014 (2022-02-03)
**Vortoj: UEA partneras en nova
EU-projekto [...]**

TEJO



20/02/2022
**Mesaĝo de TEJO
okaze de la
Internacia Tago**

de la Gepatra Lingvo

La 21-an de februaro estas la tago
kiun elektis Unesko por konsciigi
pri la graveco de niaj lingvoj
denaskaj, memore al [...]

17/02/2022

**Ni serĉas faciligantojn por
seminario pri demokratio**

La Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo (TEJO)
kunlabore kun la Konsilio de
Eŭropo (KdE) organizas la
internacian seminarion 'Esplorante
Demokration – Junuloj revigligas
niajn demokratiojn [...]

16/02/2022

**Partoprenu trejnadon en Prago
pri intersekcia aliro**

La Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo (TEJO)
kunlabore kun la Konsilio de
Eŭropo (KdE) organizas la
trejnadon [...]

09/02/2022

**Ĉu vi eklernis Esperanton dum
la pandemio?**

Ĉu vi eklernis Esperanton dum la
pandemio? Ni volas aŭdi pri via
sperto! Ekde la komenco de la
kronvira pandemio, pluraj homoj
de la tuta mondo eklernis [...]

01/02/2022


IJK 2023 okazos en Italio

Ni ĝojas anonci ke la 79-a
Internacia Junulara Kongreso de
TEJO – IJK2023 okazos en Marina
di Massa, Italio! Marina di Massa
troviĝas en Toskanio, sur la Tirena
marbordo. La Apuanaj Alpoj estas
atingeblaj en ĉ. 30 minutoj. La
[...]

Leteroj de niaj legantoj



Koran dankon kaj gratulon!
Maria Nazare Laroca el Brazilo



Merhaba!
Dankon!
Magdaléna Feifičová - Fejfi el Ĉekio



Karaj, multegajn dankojn.
Adri Pásztor el Hungario



Dankon pro la bela revuo. Mi tutkore deziras al vi sanon kaj kuraĝon por daŭrigi la bonan laboron.
Amike,
Luiza Carol el Israelo



Mi ĵus ricevis la novan numeron de via revuo. Koran dankon pro la sendaĵo kaj gratulon pro via konstanta laboro.
Franciska Toubale el Aŭstralio



Karaj, Salutojn.
Unue dankon pro la ricevita januara numero de T.S.
Jen alia poemeto por la venonta numero.
Bonan laboron,
Carmel Mallia el Malto



Kara redaktanto de Turka Stelo,
Via revuo iĝas nelegebla, ĉar ĝi havas tro da interesa materialo, tamen daŭrigu tiel.
Amike,
Renato Corsetti el Britio



Karaj, mi kore dankas por la februara numero de La Turka Stelo, kiu malfermiĝas per impresiga bildo de Istanbul kovrita de neĝo. Ankaŭ min trafis iamfoje neĝo en la aeroporto de tiu majesta urbego, survoje al Dubai. Mi ĉerpis el diversaj riĉaj materialoj fabulon de Krilov, por nialanda bulteno, kvankam ĉiuj rubrikoj estas riĉinformaj. Mi proponas al vi artikolon de sinjorino Fatbardha Demi pri la antikveco de la albana lingvo, kio eble interesus ankaŭ la legantojn de TS, ĉar nia lingvo troviĝas ĝuste funde de la europoa lingvofamilia arbo preter la greka kaj armena.

Antaŭdankon,
Amike
Bardhyl Selimi el Albanio



Saluton, estimataj.
Elkore mi dankas pro la ĵus ricevita februara numero de Turka Stelo. Ĝhi, kiel kutime, estas interesa, alloga kaj leginda. Atentokapta estas tiu artikolo pri Esperanto, verkita de Renato Corsetti. Kun plezuro mi legas Tempon Sigelitan, kompilitan de Konuralp Sunal pri kinoarto, kio ne estas elĉerpebla. Kvankam pri Helena mitologio mi legis en litova, tamen kun plezuro mi legas pri ĝi en Esperanto, verkita de Spiros Sarafian. Artikoloj pri Esperanto literaturo originala kaj tradukita ĉiam estas preferataj. Aparte tiuj el Facila.org retejo, ŝercoj, anekdotoj, humuraĵoj, konkursaĵoj de EKRA, fabloj de I. Krilov. Aparte mi ĝojas pro la bonega traduko de "La aventuroj de Glano...", plenumita de mia samlandano A. Vaitkevičius. Mi mem tradukas esperanten alian porinfanan libron de tiu sama aŭtoro V. Petkevičius, nome "Klafto, la filo de Sprindis". Hodiaŭ mi sendas por legantoj de Turka Stelo novan mian ĵusverkitan humuraĵon.
Kun amikaj salutoj,
Laimundas Abromas el Litovio

Internacia tago de la gepatra lingvo

INTERNACIA TAGO DE LA
GEPATRA LINGVO
21-a de februaro 2022

La internacia lingvo Esperanto respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturan diversecon tra la mondo kaj la uzadon de gepatraj lingvoj en edukado ĉie

UEA

HOPKINS



Quasimodo en la BBC televidserio de 1982 "La Ĝibulo de Notre Dame", kiu estis adaptado de la verko de Victor Hugo, kaj mi estis ege impresita. Tiel, ke spektinte lin, mi enŝovus kusenon en la dorson de mia piĝamo, kaj starus antaŭ la spegulo kaj imitus lin klinante mian korpon kaj pretendi ĝibulon. La voĉo donita al Quasimodo, de Sezai Aydın, unu el la turkaj aktoroj de teatro kaj dublado, kiu jam forpasis, igis tiun frenezan Quasimodo'n eĉ pli kompatinda kaj la voĉo integriĝis perfekte kun la aktorado de Hopkins.

"Esmeralda... Ŝi donis al mi akvon! Ŝi taksis min homo..."



de la kolora gazetararo. Li estis filo de bakisto, li studis teatron, li havis alkoholproblemon ktp.

Mi spektis ĉi tiun bonegan aktoron poste en la filmoj "The Remains of The Day", "Shadowlands", "Magic", "The Elephant Man", "Across The Lake", "84 Charing Cross Road", "Bram Stoker's Dracula", "Amistad", "Hitchcock", "Silence of The Lambs" kaj "The Father".

Lia familia nomo ĉiam memorigis min pri Anthony Perkins. Hop-kins, Per-kins... Tiu estas la sola simileco. Alie, ili ne estas kompareblaj. Hopkins estas multe pli supera aktoro.

Angla amiko mia iam diris, ke li trovas lin enuiga kaj mi kontraŭis al

tio. Kia homo li vere estas ne estas grava por mi. La difinon "enuiga" diris mia amiko dum ni diskutis pri iu intervjuo de li. Mi pensas, ke en tiu intervjuo li estis tute natura kaj kio ajn li vere estis. En intervjuo kun Larry King, li emfazis, ke li ne zorgas tro multe pri aktorado, kaj ke li zorgas pri aliaj aferoj de vivo (ekzemple pentrado kaj muziko). Li ankaŭ havas konponaĵon prezentitan de la orkestro Andre Rieu. Lia edzino sendis ĉi tiun komponaĵon al la fama direktisto Rieu seninformante Hopkins. Hopkins surpriziĝis kiam la direktisto inkludis tiun muzikpecon en la repertuaron de la orkestro. Li ankaŭ havas 9 simfoniajn muzikpecojn, kiujn li donis al la Birmingham Simfonia Orkestro.

"Mi ne volis, ke la potenco en la centro de mia vivo estu nur rolludado. Aktorado, aktorado, aktorado... Mi ne prenas ĝin tiom serioze. Mi volas havi vivon ekstere. Ĉar tio estas sana, kaj tial mi muzikas, pentras. Mi spektas la naĝadon de balenoj. Mi volas havi plenplenan vivon. Sed mi ankaŭ ĝuas rolludadon."

Laŭ mi, tia estas la vera artisto. Kvankam li amas sian profesion, li estas homo, kiu ne kaptiĝas en idealo.

"Se estas unu afero, kiun mi plenumis, tio estas ne preni min serioze. Mi ĝuas tion, kion mi faras kaj ili pagas min pro tio. Vi scias (tion diras al Larry King) antaŭ jaroj mi estis sur la scenejo kaj ludis Reĝon Lear. Iun vesperon mi diris al mi: 'Kion mi faras? Mi estas 37-jara kaj mi povas portreti 80-jaraĝan barbulon? Ĉi tiu estas tuta fiaĵo!' Kaj mi decidis forlasi ĉi tiun laboron. Mi diris, ke mi ne povas fari ĉi tiun laboron (Li parolas pri teatro). Eĉ hodiaŭ, revenante hejmen de mia laboro mi diras al mi mem 'Kion mi faras?'. Sed mi ĝuas tion kaj oni pagas al mi pro tio."

"Ĉu vi havas bedaŭrojn?" demandis Larry King.

"Ne. Ni ne havas tempon por bedaŭri. Ni vivas nian vivon. Gravas, kiu ni estas, kaj ne tiu, kiu ni pensas ke ni devas esti. Mi akceptas min tiel, kiel mi estas... Ne kiel mi devas esti. Ĉar ĝi estas mensogo!.. Mi estas maljuna pekulo. Mi faris multajn malbonajn aferojn, mi faris ankaŭ multajn bonajn aferojn. Ni devas pardoni nin kaj plui."

Denove, al demando pri morto, li emfazas, ke li pensas pri morto preskaŭ ĉiutage, sed tio ne estas penso devenanta de timo pri morto. Li diras, ke tio estas sonĝo ene de sonĝo, kiel diris Edgar Allen Poe ("A Dream Within a Dream" poemo de Poe).

En 2021, li ricevis la premion de Plej Bona Aktoro pro sia grandioza aktorado kaŝita en sia senpretendeco en la filmo "La Patro" (The Father), sed li ne ĉeestis la ceremonion. Hopkins, kiu estis en



Mi legis, ke la homoj de la nuntempaj niaj socioj, agas kaj kondutas plejparte laŭ la normoj metitaj, ofte altruditaj, de aliuloj, de la plejmulto, sed kelk-foje ankaŭ de nur malmultaj ĉiaspecaj fortuloj. Estas tre malmultaj tiuj, kiuj dekliniĝas de tiuj normoj kaj ankoraŭ pli malmultaj tiuj, kiuj, rigardante nur rekten, antaŭen, fidele sekvas, dum sia tuta vivo, la principojn truditajn de ilia instinkto, de la propra moralo kaj sento pri la honoro kaj memrespekto.



Kaj estas iu malnova mia instruisto, kiu diris, ke por havi trankvilan dormon, ĉiu homo devas antaŭ la kusiĝo scii, ke dum la tago li faris ĝuste tion, kion postulas lia konscienco.

Kiam mi pensas pri tiaj aferoj, mia menso iras rekte al Diomedo, la heroo pri kies nobleco kaj honorindeco mi havas nenian dubon.

Mi, do, rakontos ĉi-tie la historion de tiu mia amata Diomedo, tamen mi devas komenci de iom pli antaŭaj personoj kaj okazintaĵoj.

Kiam reĝo de la potenca Argo (Άργος) estis Adrasto (Άδραστος), viro tre riĉa, saĝa kaj bonkora, tute koincide, preskaŭ samtempe, rifuzis al lia palaco du fremdaj princoj. La unua estis Poliniko (Πολυνείκης), unu el la du filoj de la ekzilita reĝo de Tebo (Θήβα), Edipo (Οιδίπους), kaj la dua estis Tideo (Τυδεύς), filo de la reĝo de Kalidono (Καλυδών), Ojneo (Οινεύς).

La unua, Poliniko, estis perforte forpelita de sia frato Eteoklo (Ετεοκλής), kiu, post la detronigo de sia patro, uzurpis la reĝan kronon kaj potencon kaj forpelis sian fraton. La dua, Tideo, en ekzerca skermo, senintence mortigis iun sian kuzon, do, laŭ la kutimoj de la epoko, li devis foriri de sia patrujo kaj serĉi pri satisfakcio kaj pekliberigo ĉe fremda suvereno. Nu, Adrasto, homo gastama, bonakceptis la du junulojn kaj volonte lokigis ilin ĉe si.

La reĝo havis du belajn, junajn filinojn, kaj ĉar la amikeca etoso en la palaco post nelonge iĝis pli kaj pli

varma por la gejunuloj, kaj ĉar la reĝo, konatiĝinte pli bone kun la du junaj viroj, simpatiis kaj estimis ilin multe, tute diskrete favoris la alproksimiĝon kaj tiele, post kelka tempo, la du junuloj edziĝis kun la reĝidinoj, Poliniko kun Argia (Αργεία) kaj Tideo kun Diepila (Διηπίλη).



La du paroj, sub la protektado kaj zorgo de la bonkora, potenca reĝo, vivis feliĉe, tamen ili ne povis esti trankvilaj kaj kontentaj, ĉar la ŝulditaj al ili kontoj ne estis elpagitaj!

Poliniko devis reakiri la reĝan tronon de Tebo kaj Tideo, por reveni al sia patrujo, unue devis elliberigi sian patron, la reĝon de Kalidono, Ojneon, kiu, dum lia foresto, estis detronigita kaj enkarcerigita de parencaj malamikoj.

Adrasto, kiu amis siajn bofilojn, bone komprenis, ke viroj noblaj kaj fieraj, portante tiajn pezojn, ne povas esti trankvilaj. Do, li decidis helpi, kaj tute subteni ilin. Kaj ĉar Argo estis tre potenca, riĉa kaj granda ŝtato, dividita en multaj fortaj civitoj, estis preparita, unue granda ekspedicio kontraŭ Tebo, la patrujo de Poliniko.

La grandan ekspedicion partoprenis sep armeopartoj, komandataj de sep potencaj suverenoj el la vasta teritorio de Argo. Estas pro tio, ke tiu granda ekspedicio ricevis la nomon "Sep kontraŭ Tebo". Inter tiuj sep armeestroj estis, kompreneble, Adrasto, Poliniko kaj Tideo.

Mi ne priskribos tiun tre krizan kaj interesan militon, mi diros nur, ke la grandioza ekspedicio de Argo tute fiaskis. Tebo ne estis konkerita kaj el la sep militestroj ses perdis sian vivon. Nur Adrasto saviĝis kaj revenis venkita hejmen. Inter, do, la malbonsortuloj de tiu fatala ekspedicio estis ankaŭ niaj du herooj, Poliniko kaj Tideo.

Kio, do, restis el ili en Argo?

Restis Diomedo, kaj tiu Diomedo estis la filo de Tideo, junulo kun karaktero perfekta, je ĉio nobla, forta, kapabla, precipe prudenta kaj saĝa. Tiu lasta lia eco estis precipa en Diomedo, ĉar forto sen juĝkapablo egalas al malforto.

Estas eble pro tio, ke Diomedo havis tre potencon protektanton kaj tiu estis la granda diino de la saĝeco, Atena (Αθηνά), kiu, nekonate kial, simpatiis kaj atentis la heroon.

Diomedo, krom ĉio alia, ekde sia frua juneco montris, ke li estas tre forta kaj lerta militisto. Kaj li ne sciis la vorton "malvenko", li eĉ ne povis kompreni kion tiu vorto signifas; li ne nur diris, sed sincere kredis, ke tia ideo ne povos lin tuŝi. Jes, estas vere, ke Diomedo kredis nur al la venko!

Lia fiereco ne permesis al li forgesi la fiaskan militiron kaj la hontigan finon de sia patro, kiun li ne povis kompreni. Do, kiam li viriĝis, kun la permeso kaj helpo de sia avo Adrasto, kunvenigis la filojn de la ses ceteraj armeestroj, de la malnova ekspedicio kaj organizis novan militiron, kontraŭ la nekonkeritan, fortikan Tebon

Tiu dua milito estis tute sukcesa por la Arganoj kaj Diomedo. Tebo estis konkerita kaj detruita kaj la venĝo de Diomedo estis tute sukcese farita!

Tamen, la juna heroo devis plenumi ankaŭ duan taskon kaj tiu estis la elliberigo de sia maljuna avo Ojneo, kiu, detronigita antaŭ jaroj, estis ĉiam enprizonigita, en Kalidono. Do, sekrate de malmultenombraj milit-spertaj kunuloj, neatendite, subite invadis la patrujon de sia patro, li surprizis la gardistaron, li konkeris la ĉefurbon, li kaptis kaj mortigis ĉiujn malamikojn de sia familio, li elliberigis sian senpovan avon, kaj foriris, stariginte sur la tronon de la lando, iun sian kuzon.

Intertempe, ĉar en la milito kontraŭ Tebo falis la sola filo de Adrasto, post la morto de la granda reĝo, la sceptron de Argo prenis Diomedo, kiu estis edziĝinta kun la nepino de Adrasto, Egiala (Αιγιάλη)

La militaj sukcesoj de la juna reĝo disvastigis lian famon en la tutan Helenujon. Ĉie estis konata la braveco kaj militista kapablo de Diomedo. Tiel, kiam la helenaj suverenoj estis alvokitaj al la tuthelena militirado kontraŭ Trojo (Τροία), Diomedo estis unu el la unuaj, eĉ la ĉefaj militestroj, kiuj sin oferis al la nacia devo, eĉ kondukante 80 ŝipojn kun multenombra armeo el Arganoj.

En Trojo, Diomedo distingiĝis per sia forto, kuraĝo kaj militlerteco. Laŭ la forto, la kuraĝo kaj la militkapablo li povis esti komparata nur kun Aĥilo (Αχιλλεύς) kaj Ajakso (Αίας). Lia precipa karakterizaĵo estis tio, ke, dum la batalo, li estis senbride perforta, tiom impeta, ke li tuj forgesis ĉion, li tute ne sekvis la ordigitan de liaj stabanoj batal-planon, li sin ĵetis antaŭen, nereteneble, kvazaŭ blinda, kaj kuntiris la tutan sian korpuson, al kiu li permesis nek momentan retiriĝon. Tio estis tre danĝera, ĉar tiele la fortoj de Diomedo apartiĝis de la cetera helena armeo, ariergardo ne estis por ili, tiele, ofte ili estis ĉirkaŭataj de malamikoj, tamen nenio povis haltigi Diomedon. Liaj kunbatalantoj kredis, ke li estis tiom riskema kaj tromaltima, ne nur ĉar li bone sciis sian forton kaj kapablon, sed ankaŭ ĉar li estis certa, ke antaŭ li ĉiam iras kaj gvidas lin Atena!

Li estis tiom senbride impeta, ke li estas la unua kaj sola mortemulo, kiu, dum batalo vundis sinsekve tri diojn!

Jes, ankaŭ tio okazis kaj okazis, kiam Diomedo,

dum kruela batalo, troviĝis antaŭ du tre grandaj trojaj herooj. Ili estis Pandaro

(Πάνδαρος), suvereno el Likio (Λυκία), aliancano de la Trojanoj kaj Eneo (Αινείας), la granda troja heroo, nevo de la reĝo

Priamo (Πρίαμος) kaj estro de la Dardanoj (Δάρδανοι). Diomedo, troviĝinte antaŭ tiuj du tre fortaj kontraŭuloj, ne hezitis. Manipulante sian tre pezan glavon kvazaŭ ĝi estus lanugo, li sin ĵetis kontraŭ ilin. Kaj ĉar la kontraŭuloj regresis celante meti lin inter si, mallevinte la glavon, fulme kaptis, eltiris de sia dorso la mallongan lanĉon kaj vivege ekĵetis ĝin kontraŭ Pandaron, kiu falis, trapikita, senmorta. Tuj tiam, Diomedo levis grandan ŝtonon, kaj ĵetis ĝin sur Eneon, kiu, trafite sur sia kasko, perdis la ekvilibron kaj faletis. Tamen, kiam Diomedo sin ĵetis kontraŭ la genuintan malamikon, la diino Afrodita (Αφροδίτη), la patrino de Eneo, kiu nevidate estis ĉiam apud sia filo, staris antaŭ li kaj akceptis la glavbaton. Tamen, ŝi levis sian konfuzitan filon kaj provis kuri kun li foren. Diomedo furioze postkuris la malamikon kaj kiam ankaŭ la dio Apolono (Απόλλων) promptis helpi Afroditan, akceptis baton de Diomedo, kiu, sciante nenion pri la nevidataj de li vunditaj dioj, daŭrigis la persekutadon de sia malamiko ĝis la murego de la fortikaĵo, tiel impete, ke ankaŭ Areson (Άρης), la intervenintan teruran dion de la milito, vundis!

Estis ja Atena, kiu gardadis kaj savis Diomedon, tiun fojon de la kolero de la surprizitaj dioj.

En la longa daŭro de tiu milito, iĝis kutimo, ia nekonata ĝis tiam honor-regulo, laŭ kiu, kiam renomaj armeestroj el la du flankoj renkontiĝis sur la bataltereno, devis batali inter si. Ĉiufoje kiam tio okazis, la ceteraj batalantoj de ambaŭ flankoj retiriĝis kaj la batalo iĝis duelo inter la kontraŭaj estroj. Nur kiam unu el ili falis, vundita aŭ mortigita, la ĝenerala kolizio eksplodis denove, eĉ ankoraŭ pli violente.

Diomedo, ĉiam sentima, aspiris tiajn grandajn venkojn, do, li kutimis dissendi fidindajn spionojn en ĉiujn direktojn de la batalkampo, kaj kiam li ricevis informon pri la esto de iu renoma kontraŭulo, li ekiris al ties renkontiĝo. Tiele, dum la milito li alfrontis multajn famajn, tre glorajn kontraŭulojn, multajn el kiuj li mortigis en tiaj duellaj bataloj.

Unu tagon, en la daŭro de ordinara batalo, tute hazarde, Diomedo troviĝis antaŭ granda, peze armita





grupo da sovaĝaj malamikoj, kiuj ĉirkaŭis, evidente tre briln, batalastron. Diomedo, portante sian tutan armilaron, per glaŭtega voĉo provokis la fremdan estron al duelbatalo. La viroj de ambaŭ flankoj tuj retiriĝis kaj antaŭ Diomedo eliris, kun fiero sinteno kaj sovaĝa mieno, vere brila laŭ la eksteraĵo kaj la armilaro, altastatura viro.

La du batalantoj staris la unu kontraŭ la alia, ili samtempe tiris la glavojn, faris la unuan paŝon, sed la saman momenton ili ambaŭ haltis, la unu rigardis de proksime la alian kaj, el la signoj de la ŝildoj, ili interkoniĝis. Kontraŭ Diomedo staris Glaŭko (Γλαύκος), unu el la renomaj herooj de Likio. Ambaŭ viroj sciis, ke iam, antaŭ multaj jaroj, la avo de Diomedo, Ojneo, estis longe gastiginta en Kalidono la avon de Glaŭko, la grandan heroon Belerefonton (Βελλερεφόντης). Kaj, laŭ la kutimoj de la epoko, tia amika kunligiĝo estis por eterne heredigata ankaŭ al la posteuloj de la du, per gastado kunligitaj, amikoj. Do, tiuj du noblaj viroj ne povis esti kontraŭuloj, ili salutis sin reciproke per man-premo, ili donace interŝanĝis inter si siajn armilojn kaj retiriĝis. Kaj la Helenoj, post tio, ŝerce interrakontadis la eventon kaj ridis, ĉar la armilaro de Glaŭko kostis la centoblon de tiu de Diomedo.

La plej granda kaj impresa bravaĵo de Diomedo, tre signifa por la sukcesa finveno de la milito, estis la ŝtelo de la troja paladio (παλλάδιον). Kaj "paladio" estis nomata ĉiu kaj ĉia idolo de la diino Atena, kies kromnomo estis Palasa (Παλλάς). Laŭ la tradicio de la Trojanoj, tiu ilia paladio, la praajn tempojn estis falinta el la ĉielo kaj ĝi estis la simbolo de la sendependeco de la lando. Ĉiuj kredis, ke kiom longe tiu paladio estos en Trojo, la tuta lando estos tute sekura, neniu malamiko povos ĝin konkeri. La longa daŭro de la milito montris, ke tio estis ĝusta; la Trojanoj ne timis, ne cedis, ili tute fidis la di-senditan al ili dian protekton.

Tiu troja paladio estis starigita en la centra, granda sanktejo de la diino Atena, en la plej bone gardata loko de la impona ĉefurbo. La Helenoj, ĉu ĉar ankaŭ ili kredis, ke la idolo vere protektas Trojon, ĉu ĉar ili deziris senigi la malamikojn je la memfido kaj sentimo, decidis ŝteli tiun sanktan statueton. La unua kiu volonte prenis sur sin la gravan kaj tre danĝeran taskon eniĝi tute sola en la neston de la sovaĝaj

malamikoj, estis kompreneble Diomedo. La dua, same riskema, temerara kaj tre inĝenia heroo estis Odiseo (Οδυσσεύς), la reĝo de Itako (Ιθάκη). Tiuj du, do, alivestiĝinte, preninte sur sin la formon de vilaĝanoj transportantaj grenon, sukcesis eniri en la urbon. La priskribo de tiu aventuro postulas apartan rakontadon, ĉi tie mi diros nur tion, ke la du herooj, helpe de spionoj, sukcesis ŝteli la idolon kaj tio estis unu el la plej signifaj atingoj de la helena flanko, kiu eble signis la sukcesan finon de la tuta milito. Tiun bravaĵon de la du herooj, la Helenoj rakontadis dum centoj da jaroj al la infanoj kaj ĉiuj parolis kun admiro pri Diomedo kaj Odiseo!

Diomedo estis tia, sovaĝa, temerara kaj terura militisto, tamen li neniam faris ion ajn kontraŭan al la morala sento kaj la honoro de libera viro. Pro tio, kaj ĉar li estis saĝa, ĉiuj ceteraj helenaj armeestroj estimis kaj respektis lin kaj tre ofte fidis liajn konsilojn kaj akceptis liajn proponojn. En ĉiuj okazoj, kiam pro iaj ajn kialoj la Helenoj perdis sian kuraĝon, Diomedo estis tiu, kiu rekuraĝigis ilin. Kaj kiam, en konsilio de la armeestroj, estis de multaj flankoj proponita la rompo de la sieĝo kaj la foriro de la helena armeo, Diomedo deklaris, ke li ne povas foriri, ke lia armeo restos en Trojo ĝis la fina venko.

Kiam la milito finiĝis, kiam la helenaj armeoj lasis Trojon, la ŝiparo de Diomedo, malkiel okazis al aliaj armeoj, sen problemoj kaj aventuroj, post longa navigado, atingis Argon. Tamen, antaŭ la elŝipiĝo de la armeo, Diomedon atingis tre surpriza kaj malagrabra novaĵo; dum lia longa, dekjara jam, foresto, lia edzino, la reĝino Egiala, ne restis fidela al li. Kiam pasis la unuaj jaroj de lia foresto, dum kiuj neniu mesaĝo aŭ ia ajn informo atingis ŝin, krom famoj, jen pri totala pereco de la helena armeo, jen pri decido de la Helenoj resti kaj fondi novajn civitojn en la malproksima, riĉa Trojlando, kondukis la virinon al la decido daŭrigi sian vivon ĉe la flanko de nova edzo. Multe pli poste, la homoj diradis, ke tio estis la venĝo de Afrodita, kiu ne forgesinte la ofendon de Diomedo, inspiris al Egiala ampasion al la nova edzo. Kaj tiu nova edzo estis Kometo (Κομήτης), fidinda viro, kiun Diomedo estis lasinta sur sia loko, responda pri la regado de la lando, de lia familio, domo kaj havaĵo. Kaj tiu Kometo estis viro honesta kaj kapabla kaj populara, jam aprobita kaj amata de la popolo de Argo. La saĝa Diomedo malĝojis; li komprenis ke nur perforte kaj tre malfacile, kun pezaj perdoj, li povus reakiri ĉion perditan. Lia saĝeco ne permesis al li riski la sekurecon kaj la vivon de multaj homoj pro privata afero, cetere li ankaŭ sciis ke la pravo estas sur la flanko de la virino, ke la eraro estas sia. Do, sekvate de siaj plej fidelaj kunuloj, per ne tre multaj, sed bone provizitaj, ŝipoj, li foriris, li ekiris

irante okcidenten.

Ŝajnas, ke Atena neniam ĉesis protekti Diomedon, kiu, post sendanĝera ŝipirado, iam atingis la orientajn bordojn de Italujo, ĉe la kabo Gargano (Γάργανον), tre apude al la riĉa kaj prospera lando Daŭnio (Δαυνία).

Ŝajnas, ke la famo de la glora, nevenkebla helena militisto antaŭiris lian armeon. Nu, la reĝo de la lando, Daŭno (Δαύνος), senpacience atendis Diomedon, ĉar lia civito estis longe sieĝata de la Mesapioj (Μεσσάπιοι), malamika gento el Kalabrio, kaj lia armeo, ne sufiĉe forta kaj jam tre laciĝinta, estis elmetita al la danĝero de totala pereco. La reĝo bonakceptis Diomedon, li petis pri lia helpo, promesinte, ke, en okazo de sukceso, li liveros al li vastan teritorion de sia lando por ke li fondu novan, propran civiton.

Diomedo ne hezitis, li prenis sur sin la taskon forpeli la invadintojn kaj liaj efikaj planoj, la kuraĝo kaj la lerteco de siaj spertaj batalantoj kaj lia propra braveco, post kelk-monata milito, liberigis Daŭnion.

La Helenoj sin lokis en sian novan patrujon, kie ili prosperis. Diomedo edziĝis kun filino de Daŭno, li akiris infanojn kaj post longa tempo de feliĉa vivo, mortis pace!

La homoj diradis, ke kiam li mortis, Atena donacis al li la senmortecon, ŝi kondukis lin al Elizeo (Ηλύσια Πεδία), kie la brila, glora heroo ĝuas la eternan feliĉon de la senmortuloj.

Tamen, ŝajnas, ke, malgraŭ tio, ke la Arganoj vivis pace en sia nova patrujo, eble pro ilia progresemo, laboremo kaj kapabloj, kiuj portis al ili riĉaĵojn, kaŭzis la envion de kelkaj indiĝenoj. Kiam Diomedo mortis, la pli maljunaj liaj kunuloj enterigis lin en proksima insulo, kiu ricevis la nomon de la heroo Diomedio (Διομήδεια). Tie ili starigis imponan steleon kaj ĉiujare ili kolektiĝis tie kaj solene honoris la neforgeseblan grandan heroon per ceremonioj kaj sanktoferoj.

Kiam mortis ankaŭ la reĝo Daŭno, kiu ĉiam protektadis siajn helenajn savintojn, ties politikaj kontraŭuloj konspiris kaj la tagon, kiam la maljunaj Arganoj kolektiĝis en Diomedio por celebri la memorceremonion de sia mortinta estro, ili surprizis, atakis kaj mortigis ĉiujn!

La homoj diradis, ke Atena, ankaŭ tiujn kunulojn de Diomedo tenis vivantaj. La diino aliformigis ilin en birdojn, kiuj vivas nur sur tiu insulo. Kaj oni diradis, ke kiam helena ŝipo atingis la insulon de Diomedo, centoj da tiaj birdoj ekaperis, traflugadis ĉirkaŭen, kvivitante ĝoje, ili proksimiĝis al la helenaj maristoj, ili lasis ilin karesi kaj manĝigi ilin. Tamen, kiam aliaj, fremdaj homoj atingis tiun insulon, la birdoj ne aperis!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekio

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Ferenc Szilágyi: Novelisto kun du hejmlandoj

Malmultaj Esperanto-verkistoj tiom plene dediĉis sian vivon al multflanka kaj rezultodona laboro por Esperanto kiel Ferenc Szilágyi, homo de multaj talentoj. Ferenc Szilágyi naskiĝis en 1895 en Budapeŝto. Liaj junaĝaj jaroj estis malfacilaj, liaj gepatroj estis malriĉaj, sed li, tamen, povis fini gimnazion. En lia poemo Vivraporto oni povas legi pri la zorgoj de liaj gepatroj pro liaj pluaj studoj:

*Nun sekvis zorgoj: kie prenu
Gepatroj monon por la fil'.
Sopiris ĉiuj ni kun mil
Esperoj, ke la Tago venu.
Ĝi venis: mi al patra dom'
Fiere iris kun diplom'.*

Szilágyi diplomiĝis kiel doktoro pri juro. Sed la malfaciloj ne ĉesis, kaj dum jaroj li estis plejparte senlabora, kiel miloj da hungaraj intelektuloj dum la jaroj inter la du mondmilitoj.

Szilágyi lernis Esperanton en 1924 kaj tuj komencis fervore labori en la Esperantomovado. En 1932 kaj poste li instruis Esperanton en Svedio en dekoj da sukcesaj kursoj kaj faris multajn prelegojn. Tiu agado preparis por li la vojon al definitiva enloĝiĝo en Svedio ekde 1938. Li fariĝis sveda civitano, sed liaj ligoj kun la gepatra lando kaj ĝia kulturo tamen daŭre estis fortaj.

Kiel originala verkisto Szilágyi estas plej konata kiel proza verkisto, precipe de noveloj. Li tamen verkis ankaŭ poemojn, sed ili neniam aperis en aparta poemlibro. En 1929 tamen aperis volumo de liaj tradukoj de poemoj de 53 hungaraj poetoj, kaj en 1934 kelkaj liaj originalaj poemoj aperis en la kolekto Dekdu



poetoj.

La unua originala novelaro de Szilágyi, *Trans la Fabeloceanon*, aperis en 1931. Ĝi havas la subtitolon *Modernaj fabeloj*, ĉar la aŭtoro ne sekvas formulojn karakterizajn al tradiciaj fabeloj, sed provas modernigi la inkliojn de siaj fabelaj kreitaĵoj. Tiu metodo montras tendencon al milda ironio, kiu ĉiam poste estas konstatebla kiel ia subtono en la originalaj prozverkoj de Szilágyi.

Tri pliaj kolektoj de noveloj sekvis en la postmilitaj jaroj: *La granda aventuro* (1945), *Inter sudo kaj nordo* (1950) kaj *Koko krias jam* (1955). Ili montras lian daŭran progreson kiel verkisto. Plej notindas la humanismo de la aŭtoro. Szilágyi estas, unuavice, etika verkisto, tamen li neniam pozas kiel ĉiosciulo, kiu pretendas la rajton kritiki kaj ordoni. Liaj verkoj estas realismaj kaj ofte pritraktas konkretajn kaj psikajn problemojn.

En 1958 aperis lia sola romano, *Mistero minora*. Ĝi estas verkita en la unua persono, la mi-persono, kies pensojn la aŭtoro intime konas. Tiu metodo kondukas al psikologia pritrakto de temo, kiu evoluas kiel krima intrigo, kie la mi-persono, Marteno Bíró,

surprenas la rolon de detektivo. Li suspektas pri murdo de sia antaŭa amatino sed havas nur muzikaĵon kiel atestilon. La rakonto iras malrapide en la komenco, sed ĉiam pli akceliĝas ĝis surpriza fino. La stilo estas elasta, la lingvo bela kiel ĉiam ĉe Szilágyi. Tiu lia sola romano estas valora perlo en nia literaturo.

En 1955 Szilágyi fondis la kultur-revuon *Norda Prismo*, kies ĉefredaktoro li estis ĝis sia morto en 1967. Tiu revuo tuj fariĝis la plej elstara literatura revuo en Esperanto. La ĉefredaktorecon baldaŭ transprenis William Auld kaj la revuo daŭris ankoraŭ kvin jarojn, ĝis 1972. Provo ĝin revivigi en 1974 ne sukcesis. Kiel ĉefredaktoro de *Norda Prismo* Ferenc Szilágyi floris kiel publicisto, kaj oni povas rigardi ĉi tiun lastan periodon de lia vivo kiel kronon de lia multvaria kaj sukcesa laboro kiel unu el la plej energie optimismaj aktivuloj sur la kampo de Esperanto kaj ĝia kulturo.

de **Baldur Ragnarsson**

Juna amiko, n-ro 101, 2002

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/szilagy.html>

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso¹: Pri amo

Historioj kaj maloj

Fabeloj pri viro kaj virino

Mirlando de la obsceneco

Mi venis sur aŭtovojon kaj ne povis vidi, ke ĝi havis la formon de banto, la formo de la interplektitaj nuloj de la senfinecosigno. Jen staris Saab ĵus forlasita de du meĥanikistoj kaj atendis min kun malfermita pordo kaj kun la veturilpapiroj pinĉitaj malantaŭ la glacoviŝiloj. Knabino, infano, sidis apude sur sia valizo. Mi demandis, kion ŝi deziras. Al Bruselo, volis la knabino, kiu iris en mian veturilon. Matenkrepusko ĉe ŝtongriza ĉielo. Ni ne parolis. Fermite ŝi rigardis flanken, metis la mentonon sur sian genuon. La ŝvitperloj de la plej soleca forlasiteco. Poste ŝi kontentiĝis per tio, ke ŝi prenis mian sekson en sian buŝon. Mi komprenis, ke ni ŝvebas renkonte al mondo de la plej perfekta seksa indiferento. Fermitaj homoj, profunde enpenŝiĝintaj, tre foraj en sia tuta esto, malmergas trankvile kaj senpeze al la surfaco de la homeco, kiam pornografia ĥimero logas ilin, malmergas, nur por plenumi antaŭspegulitan bildon, ĉarman figurludon, kaj poste remergas suben.

Senmalice kaj senespere. Ilia vizito en la homregno celas la mirlandon de la obsceno.

<http://vlutermano.free.fr/Strauss3.html#Mirlando>



Amakcidentoj

Sketado

Supre ĉe ridetado ni, ambaŭ seksoj, havas ankoraŭ la saman ŝancon. Sub tio la malegaleco de la korpo, la unua de la disiĝoj. Sed ke la ridetado estas la plej alta socia atingo de nia muta korpo ...

Jen mi renkontis tiun junan knabinon. Iom tro-postulite de ŝia beleco, mi gapis ofte flanken aŭ sur la proprajn manojn. Mi lasis la knabinon paroli, tri horojn preskaŭ, kaj aŭskultis, kiel ŝi simplanime kaj dorlotite, vikle kaj pure etendis siajn malspertajn opiniojn kaj restis sen ia antaŭseno en sia tuta dispozicio. Mi eksciis, ke mire belan dudekjarulinon en tiu ĉi mondo nenio interesas pli ol la propra farto kaj ties misteraj ŝanceliĝoj. Nur lastan semajnon ŝia memkonscio enorme kreskis subite kaj senkaŭze. Hieraŭ ŝi ankoraŭ vagis kantante antaŭ si tra la superbazaro. Oni vidas sin, el distanco preskaŭ dudekjara, la postnaskitino

kiel principinon sur la pizo. Oni kapjesas, oni milde ridetas kaj tamen pensas nur: tiun mi ŝatus gustumi. Nu, tiu ĉi junulino ja estas sen ia antaŭsento, sed kontraŭ delogo, influo, enamigo protektas ŝin la blinkanta skvamkiraso de narcismo, tiel ke ŝi, kiu apenaŭ povas aŭskulti, ankaŭ ne dependiĝas de iu. Kiu sentas jam sufiĉan plezuron pri si mem, tiu ne havas la sciemon miksitajn el avido, kiu en tiu aĝo nur ebligas la delogon al konscio. En la kinejo ŝi ŝatas nur gajajn filmojn. Ŝia revata profesio: filmreĝisorino; sed ĉiukaze gvida pozicio, tute egale kie. Ŝi memorigas min pri frida purulino en filmo de Bunjuelo. Sed ŝi diras: "Bunjuelo? Neniam aŭdis."

Kiam ŝi alvokis min, tiam ne preteraŭdeblis: tiu havas ion, pri kio ŝi ne bezonas honti. Hela rido ĉe la alia flanko ja diris tute klare: se vi vidus min, certe vi ne rifuzus renkontiĝi kun mi... Kaj kiel ne aŭdi ĉe la voĉo, ĉu iu estas evitata kaj premata persono aŭ iu dorlotata kaj dezirata? Mi memoras, ke ŝi rakontis al mi, ke ŝi kun dek kvar jaroj faris al si revon kaj notis ĝin - endormiga historio, en kiu ŝi aperis kiel "freneze bela knabino, do ne mi, freneze bela knabino, kiun ĉiuj knaboj trovas treege efika" ... Ĉu misparolo? Ĉu

miksaĵo de efika, edifa, fika? Mi havis subite la impreson vidi tra la fendo de la misparolo ŝian netuŝitecon. Mi devis ion diri, sed tio deglitis al banala komplimento: ke ŝi estas bela, tion ŝi vere ne bezonas rev. Ĉe tio mi ruĝiĝis. Ŝi eble ne ĝuste komprenis, kion mi diris. Aŭ mia volupte embarasita vizaĝo konsilis al ŝi rapide transsalti tiun rimarkon. Fine ŝi invitis min al kuna sketado. Mi konsentis, ĉar mi volis revidi ŝin. Sed mi scias, ke mi ne plu scias sketi. Antaŭ nelonge kvin infanoj devis detiri min ĉe la brakoj de la glaci-sketejo, ĉar mi ne povis min plu teni stara sur la sketiloj.

<http://vlutermano.free.fr/Strauss3.html#Sketado>

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Triobla Edzo

fabloj de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Okazis, iu Edz', frivola laŭ naturo,
Ankoraŭ havis du edzinojn en sekret'.
Skandala tiu fam' atingis en konkret'
Al Reĝo mem. La Reĝ' kun malplezuro
Eksciis pri afer'
Kaj tuj ordonis li prijuĝi kun sever'
Kaj frap' al fripon' per tia akra puno,
Ke teruriĝu la popol'
Pri abomeno de frivol'
Kaj pri la krimo-maksimumo.
"Kaj se ekscios mi, ke pun' malgrandas nur,
Ekpendos juĝistar' sur unu granda ŝnur'."
Malbonas la promeso:
Juĝistoj tremas en malvarma ŝvit',
Diskutas ili sen sukceso
Pri ekzekut' konvena, laŭ merit'.
Diversas pun-sistem', sed tamen por publiko

La punoj en abund' mizeras per efiko.
Finfine juĝistar' alvenis al konklud'
Kaj al krimul' en tribunal-kunsido
Aŭdiĝas juĝ-decido:
"Edzinojn ĉiujn tri li havu sen divido,
Kaj plu neniu sekvu persekut'."
Ekmiris pri verdikt' popolo tre rezone, —
Juĝistojn en komplet' pendigos certe Reĝ'.
Sed ne forpasis nur semajno eĉ
Kaj la krimul' pendigis sin persone.
Ĝi estis lecion' por tuta imperi'
Kaj al edzinoj tri
Neniu plu edziĝis laŭfripone.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)
Ukrainio

14>> reagis, sed ne turnis la kapon al li. Li eltiris malpeze ĉe sin kaj tentis kisi ŝin sur lipoj. Ŝi evitis tion. Tiam li kisis la vangon kaj la antaŭkolon tre volupte.

Vera retiriĝis, turniĝis al li, rigardis al okuloj kaj diris:

- Vi estas masklo, potenca kaj vi kapablas perforti min. Sed sciu ke vi atingis nenion.

Tiam li lasis ŝin kaj premis alian butonon ie. Eniris subite oficiro, kiun la ĉefo ordonis konduki la instruistinon hejmen kaj diris al ŝi bonan nokton.

- Bonan nokton - diris interdente Vera kaj postsekvis la oficiron.

(daŭrigota)

rakonto de **Bajram Karaboli**
tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

"Servuti, estas jam esti mortinta" Komento direktita al iu el la francaj ĉefaj rezistantoj al la Kovim-preteksta faŝismo:

"Ekde la komenco, mi asertis, ke nia batalo por libereco iras tre super la nuran sanitaran pasporton. Temas pri koncepto de la homo, de la homaro, la ideo kion oni faras al si pri Francujo, ĝiaj valoroj, ĝia estonteco, kiu estas en veto! Tiel, la enkarcerigo de la ne-vakcinitaj en Aŭstrio - baldaŭ imitota de Germanio? - Estas sinko de la homaro! Morala kaj etika kolapso. Krom esti perfekte senefika kompreneble. Ĉi tiu logiko de la enirpermesilo, puŝita al la fino, kondukas al la nedirebla, la apartigo, la Apartheid, kaj eble tre danĝeraj aferoj fine. Oni jam vidis tiajn.

Konsiderante ĉi tiun evoluon, kiu ĉie en Eŭropo konfirmas la tutan fiaskon de nur-vakcinado, de la sanitara pasporto, de limigoj, ni nur povas esti kuraĝigitaj en la nobla rezisto, kiun ni faras! Eĉ pli kuraĝigita, ke pasintsabate en la nacia manifestacio en Parizo ni vidis la partoprenon fulme kreski, danke al la alveno de novaj Rezistantoj: Familioj, kiuj defendas infanojn, duoble-vakcinitaj, kiuj ekdubas la oficialan diskurson, kaj decidis aliĝi al la vicoj de Rezisto. Bonvenon! La grandioza batalo gvidata de niaj samlandanoj en Gvadelupo konfirmas, ke oni gajnas, kiam oni estas unuiĝintaj, senkompromisaj kaj tenacaj!

En Gvadelupo, la batalo havas avantaĝon: la amasa implikiĝo de profesioj kiel fajrobrigadistoj, taksiiistoj, kamionistoj, kaj eĉ instruistoj, kiuj komprenis, ke ili estas la sekvaj en la listo. En Metropolo, la sindikatoj perfidas, ni scias! (Mono! Subvencioj de la Eŭrop-Unuiĝo) Aferoj estas do malpli simplaj, sed vojoj estas organizitaj, ni estas esencaj kaj noblaj, kiel en 1940-44, kaj ni iros kune al la venko"

"Kion vi faras por Francujo estas esenca, kaj endos ja neniam mallevi la brakojn eĉ se propagandi iĝas malfacila aŭ danĝera (ĝi jam iĝis foje mortiga por

certaj "malkaŝantoj" (angle whistleblowers).

Ĉiutagaj faktoj pravas, ke la interpretado de la Kovim- krizo kaj la Klaus Schwab plano, kiel novan formon de totalismo estas evidenta. Mi pensas, ke vi devas insisti pri la klarigo de ĉi tiu interpretad-krado ĉiutage, por ke tiuj, kiuj aliras la diradon dumevolue povu kompreni la situacion preter sia persona sento el supertediĝo. Ili devas iri supere, ĉar perceptis vi, pli bone kaj pli rapide ol iu ajn, ke iam la celo fari de la sendependaj ekonomie dependulojn, tiuj, kiuj planas kaj direktas tion de longe jam (vd la filmon de Olivier Probst), donos al ili la panerojn de postvivado, ili kontentiĝos per neceso de supervivo kaj tiu de siaj familio kaj parencoj. Ni devas halti ĉion ĉi."

lom da sociekonomia historio: Pensu pri la profitoj, kiujn konjekteble ĝuis la fabrikantoj de ĉenoj kun la iniciato de la antikva sklaveco ! Kaj nun pensu pri la fabrikantoj de poŝtelefonoj..... hmm ? (jen! Ho, eĉ ne necesas legi Marx-on - tamen tio helpas! - La Fabloj de La Fontain' sufiĉos! ĉar ĝi estas la rekta prudento mem. Kaj vi komprenos, kio okazas nun sur la tero)

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



(foto: manifestacio sur Trafalgar Square, Londono)

19>> **brosi:** per speciala ilo (brosio) ordigi la harojn aŭ purigi la dentojn.

cerbo: tio interne de la kapo, per kio oni pensas.

elĉerpita: jam foruzinta ĉiujn fortojn.

faldi: meti unu flankon de papero aŭ tuko sur la alian flankon, tiel ke unu flanko kuŝu sur la alia.

instrumento: fabrikita ilo kun difinita celo; muzikilo.

koncentriĝi: direkti sian plenan atenton al io.

najbaro: homo loĝanta apude.

palpebrumi: rapide fermi kaj malfermi la okulojn, aŭ nur unu okulon.

restoracio: manĝejo, kie oni pagas por manĝi.

sen-konscie: sen klara scio pri la propraj agoj kaj spertoj.

teamo: grupo de kunludantoj en sporto aŭ ludo; grupo de homoj, kiuj agas kune por plenumi iun taskon.

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/malrapidi%C4%9Du-r280/>



Ŝtonoj

„Por kio? Kial estas ŝtonoj sur la tablo?“, demandis Karl. Li ĵus ricevis sian pleton kun matenmanĝo.

Rudi klarigis: „Mi pruntis ilin de mia edzino. Nur kelkajn. Vi ja ne scias kiom ŝi intertempe jam havas“.

Estis vere tre belaj ŝtonoj. La edzino de

Rudi ŝatas kolekti ilin dum feriaj promenoj al la strandoj.

„Kaj mi devas ĉiam porti ilin en mia dorsosako hejmen!“, plendis Rudi. Tiam li komencis prezenti sian raporton.

La temo 'ŝtonoj' ne bone konvenis al li. Li tute ne interesiĝis pri la hobbio de sia edzino. Tamen li tre bone preparis sin.

„Mi mem miris pri tio, kion mi trovis. De tio vi verŝajne neniam aŭdis ion.“

Unue temis pri ŝtonoj kun truoj. Troviĝas multaj, precipe en la alpa regiono विमानतः:tas menhiroj, starigitaj ŝtonoj, parte enfositaj en la grundo, rekte starante. En la supra parto troviĝas artifika truo. Tiuj 'tru-ŝtonoj' simple staras ie, sur herbejoj, apud vojoj, en arbaroj. Verŝajne jam ekde kelkiloj da jaroj. Neniu scias kial. Povas ja esti, ke ili iam estis markoj por limoj. Sed kial ili ĉiuj havas tian truon?

La matena rondo ankaŭ ne havis ideon.

Rudi daŭrigis sian raporton: „Nun, ja, ĉi tio verŝajne ne estis tiel interesa, ĉu ne? Sed nun mi prezentas veran sensacion. Oni trovis ŝtonojn, kiuj povas kreski kaj moviĝi.“

„Ĉesigu tian stultajon!“, insultis lin Gerd, sed Rudi senkonfuzo daŭrigis.

Laŭdire tiuj ŝtonoj troviĝas en Rumanio. Ili nomiĝas 'Trovantoj' aŭ 'Vivantaj ŝtonoj'. Ili ĉiam ekkreskas post pluvo. Ili konsistas el sablo kaj mineraloj. Post dissegado montriĝas ringoj, simile al la jarringoj de la arboj. La 'Trovantoj' kutime havas strangan formon, kun rondaj tuberoj. Sed la plej mirinda afero estas, ke tiuj ŝtonoj laŭdire povas memstare moviĝi. Bedaŭrinde tion la filmo ne montris.

Ankaŭ en Hispanio troviĝas ŝtonoj, kiuj povas moviĝi. Ĉi tie la enigmo povas jam esti solvita. Estas la pluvo, kiu respondecas por la movado. La surfaco de ĉiu ŝtono estas kovrita per algoj kaj bakterioj. Tiu ŝlima envolaĵo ebligas glitadon sur ebena grunda tavolo. La

forto de la vento sufiĉas por puŝi la ŝtonojn.

„Jes, mi povas imagi tion, sed ĉu la afero rilate al la kreskado veras?“, rimarkigis Jens. Gerd aldonis:

„Vi certe konas gutŝtonojn el kavernoj. Ili ankaŭ povas kreski, ĉu ne? La stalaktitoj pendas el la plafono, la stalakmito kreskas de malsupre al supre.“

„Jes, tiu fenomeno estas konata. Mi ja nur serĉis ekzemplojn, kiuj ankoraŭ ne estas klarigitaj. Atentu, sekvas nun unu alia fenomeno. Ĉu vi konas tion? Mi denove spektis la filmon de la kavernoj, pri kiu prelegis Jens. En tiu filmo estis ankaŭ raporto pri lumantaj ŝtonoj.“

Gerd ne estis impresita: „Tiuj ŝtonoj certe enhavis instalitajn lampojn. Mia najbaro havas tian objekton. Ĝi ricevas energion de la suno helpe de nevideblaj sunradioĉeloj. Per teleregado li eĉ povas ŝanĝi la koloron.“

„Tio estas alia afero. Tiuj ŝtonoj el la kavernoj povas memstare lumi. Neniu scias kiel ili faras tion“, emfazis Rudi kaj daŭrigis sian paroladon.

La esploristo d-ro Kusch trovis kvar el tiaj ŝtonoj. Ili estis nigraj, pakitaj en lignaj kestoj. Metitaj en la sunlumon ili fariĝis bluaj. Tia koloro ankaŭ montriĝis, kiam oni tuŝis la ŝtonojn per mano. Pli poste, post priradiado per ultraviola lumo, la ŝtonoj komenciĝis lumi de interne. La iama presaĵo de la mano aperis sur la surfaco en nigra koloro. La sciencistoj ĝis hodiaŭ ne povis doni klarigon.

„Koran dankon por via interesa prelego. Tamen, mi estas iomete seniluziita. Mi esperis, ke vi rakontus ankoraŭ ion pri resanigaj ŝtonoj“, komentis Karl.


Rudi kontraŭdiris: „Tiam mi bezonus pli da tempo. Ekzistas ja multaj aliaj aferoj rilate al ŝtonoj. Ŝtonoj kun misteraj gravuritaj surskriboj, kiujn neniu povis deĉifri. Ŝtonoj, kiuj pendas dense apud deklivoj kaj ne falas suben. Kaj, kompreneble, la ŝtonoj de Stonehenge aŭ la monolitaj statuoj de la Paska Insulo. Pri tio ja povas paroli iu je la venonta fojo.“

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>





Bayram Karaboli

(daŭrigata)

un vendredon, la duan vendredon ekde la komenciĝo de la kurso, fininte la lecionon, oficiro diris al ŝi prezentiĝi ĉe la ĉefo en la oficejo. Ŝi atendis tion kaj ne tiom ŝokiĝis. La sama oficiro kondukis ŝin ĝis la oficejo en la dua etaĝo. Frapinte timeme sur la pordon la oficiro atendis iomete, poste malfermis la pordon kaj eniris. Honorigis sian superulon kaj tre ĝentile mansignis al Vera eniru. Vera eniris. La oficiro denove honorigis kaj eliris fermante la pordon. La ĉefo ekstarigis antaŭ ol eniri Vera. Kiam ŝi eniris, li gaja, eliris el sia sidloko kaj sin turnis al ŝi, etendis la manon varme kaj diris:

- Bonvenon, profesorino! Eksidu, mi petas- kaj manmotris fotelon.

Mem li eksidis en alia fotelo, simila, kontraŭŝi. Meze estis tableto, malalta. Vera sentis sin kiel en dornoj, sed ege klopodis por sin trankviligi kaj kuraĝigi.

- Ni povas alparoli unu al la alia per nomo kaj nin turnu per "ci" - la ĉefo ne demandis sed sugestis kun certa tonuso.

- Vi jes - respondis Vera, kiu estis jam trankviliginte sin.- Dum mi ne povas fari tion. Mi ne povas alparoli al aŭtoritatulo kiel vi per "ci".

En siaj vortoj ne estis ia ironieco. Nur seriozeco.

- Nu bone. Kiel vi volas Vera. Sed mi pensas ke vi iutagefaros tion ankaŭ vi, kiel mi jam faras nun. Bezonatas nur kuraĝo.

Vera komprenis klare en liaj paroloj la komenciĝon de neevitebla atako. Ne parolis. Serĉis nur kuraĝon en si.

- Kiel iras la kurso? Aŭ pli bone, kiel iras la

kursanoj? - demandis li denove dume li premis butonon, instalite ĉe la rando de la tablo.

- Bone - respondis kurte Vera kaj dumtempe klopodis eviti la estingiĝon de malfacila rideto el sia vizaĝo.



La pordo malfermiĝis kaj eniris unu servantino kun pleto, kiun ŝi lasis surtable kaj poste retiriĝis kaj eliris senvorte. Sur la pleto estis du kafoglasetoj vaporantaj kaj du akvoglasoj. La estro, senvorte kaj ĝentile, servis al Vera. Poste prenis sian kafon kaj antaŭ ol ensorbi ĝin diris:

- Ĝojon, Vera! Dolĉan panon! Tiel bonaŭguras nun por diri ke ni pasigu bone kune.

- Ĝojon! - diris Vera kaj eksentis ke tiu masklo estis kapabla altrudi aliulojn.

Post glacia silento la ĉefo ensorbis ankoraŭfoje la kafon kaj tuj ekatakis:

- Vera, ni alpaŝu rekte. Ĉu vi scias kial ci estas ĉi tie?

Vera levis la ŝultrojn por vidi, sed ne povis elteni lian penetran rigardon. Rigardis sian glaseton kaj ŝajnigante sin trankvila diris:

- Por instrui la rusan al viaj subuloj.

- Kvankam mi estas certa ke ci scias, mi diras: tio estas la fasado. Ci estas ĉi tie por mi. Por esti sincera, ne estas mia kulpo. Mi ne sukcesis rezisti al via beleco. Ekde mi ekvidis cin, mia anĝelo diris ke niaj sortoj kruciĝos.

Dum li diris tiel, gapis per okuloj Vera-n, kiu kvankam pretigita por tio, eksentis timon penetri forte en tutan sian eston. Momente pripensiĝis kajne kuraĝante rigardi lin rekte al okuloj diris:

- Mi ne scias por vi, sed mi estas edzinigita kun edzo kiun mi ege amas.

- Tio tute ne gravas. Kontraŭe. - diris li ne fininte la frazon.

Por Vera tio "kontraŭe" estis evidenta mesaĝo, estis tranĉilo kun du klingoj. Ŝi konsciiĝis kaj kun okuloj koncentritaj sur sia manhorloĝo diris:

- Jam estas tro malfrue por mi. Mi petas ke ni fermu ĉi tie nian konversacion ĉi vespere.

Ĉe la ĉefo fiksiĝis ŝia lasta vorto "ĉi vespere" kaj je venkoĝojo ekstarigis kaj diris "jes". Ekstarigis ankaŭŝi kaj tentis tentis iri al la pordo. Li kaptis ŝin permane, kaj ne atendante, tentis kisi ŝin. Vera ne

>>11

11. Ribelo

Sekvontmatene ambaŭ amikoj vizitis la militkampan malsanulejon, establitan sub grandega folio de Arktio. Ĉi tie kuŝis multego da vunditaj infanterianoj.

– Per kio vi kuracas vundojn? – demandis Glano la doktoron.

– Per espero, – tiu respondis.

– Per kia espero?

– Ke baldaŭ finiĝos la centjara milito.

– Silentiĝu, sensciulo! Ili estas kuracindaj per vakso, rezino aŭ cementa pulvoro.

– Tre korekte, – ne kontraŭis la doktoro. – Hodiaŭ por mi taŭgus eĉ ordinara poleno, sed kie ĝi estas trovebla? Cementa pulvoro taŭgas por konstrui fortikaĵojn, vakso – por purigi kanonojn, rezino – por produktado de pulvo, kaj ĉiujn aliajn postrestaĵojn forglutas la konstruado de tiu sekreta aparato. Mankas stomakŝmiraĵo, ne nur la vundŝmiraĵo. Alivorte, la vunditojn ni kuracos, kiam ni venkos la militon.

Unu infanteriano, subtenanta sin per agrostida pafilo, diris:

– He, virĉoj, vana estas via parolado. Mia avo tiun venkon sur militkampoj ne ĝisatendis, mia patro estis malliberigita kaj mi, verŝajne, en hospitalo ĝin ne ĝisatendos.

Glano ĉirkaŭrigardis kaj ĉio en liaj okuloj mallumiĝis. Ĝis rigardo atingis – ĉie kuŝis vunditoj kaj atendis la finon de la milito, kiam ili estu kuracitaj. Ili ĝemoj kaj suferoj tiel dolorigis la koron, ke li tiretis la manon de Pizo kaj diris:

– Mi jam ne plu deziras pafadi.

– Ĉu mi ne admonis vin?

– Certe, – agnoskis Glano, – sed tutegale io estas farenda.

La tutan tagon Glano pri io streĉe pensadis, desegnadis la planojn sur sablo, diskutadis kun Pizo kaj si mem, ĝis kiam li decidis:

– Vi, Rapiduleto, devos nokte eniĝi en la kavaleriistan tendaron, ŝteli la vestojn de la estro kun ĉiuj meritisignoj, kaj mi provos senvestigi la reganton de la infanterio.

– Mi nenion komprenas, – ŝultrotiris Pizo.

– Nenio estas kompreninda. Ambaŭ Sabalbonoj similas unu al alia kvazaŭ du ĝemeloj. Ni interŝanĝos iliajn vestojn, kaj la soldatoj memstare konos, kio estas farenda kun la estro de la malamika armeo.

– Kaj se ili ne estos sufiĉe saĝaj? – ankoraŭ dubis Pizo.

– Ni konsilos.

– Kaj se ili ne kredos?

– Ne estu timema, – ekkoleris Glano.

– Kaj urĝu, la someraj noktoj ne estas tro longaj.

Pizeto elkuris. Silente ruliĝis li tra la tranĉeoj, tragrimpis la baraĵojn, kaj trovinte sin en la malamika ariergardo, li falis surventre kaj ekrampis. Sed nenio efikis. Li estis tiel ronda, ke estante aŭ surdorse aŭ surventre, li ruliĝis tra la herbaro, kvazaŭ li estu puŝita for de ia monto. Tiam Pizo metis la manojn malantaŭ la dorso kaj iom post iom, kvazaŭ promenante iris al la tendo de Sabalbono. La gardistoj, vidante lin tiel digne marŝantan, ne ĝenis lin kaj el malmproksime honoris perarmile, kvazaŭ li estu plej grava gasto de la estro.

La kavaleriestro dormis, kvazaŭ mortinta. Rapiduleto sternis surplanke lian araneaĵan mantelon, staplis sur ĝi lian kaskon, vestojn, medalojn kaj krucojn, kunligis kaj surŝultriĝinte ĉion, revenis per la sama vojo.

Glano ankoraŭ forestis en la tendo. Li ankoraŭ kuŝis surventre ĉe la tendo de la infanteriestro kaj atendis ĝis kiam estingiĝos la lumo aŭ ekdormos la gardisto. Dezirante certiĝi, ĉu la soldato dormas, li ĵetadis ŝtonetojn al li. La soldato tuj ekrigardadis ĉirkaŭe. Glano havis nenian alian solvon de la problemo krom forte frapi lian okcipiton.

Eniĝinte interen, li senpene kolektis ĉiujn brilaĵetojn kaj vestojn de Sabalbono, surdorsigis ilin kaj jam deziris kaŝiri reen, kiam li hazarde ekvidis starantan grandegan spegulon kiu allogis admirin sin.

Unue Glano ĉirkaŭrigardis sin de kapo ĝis piedoj, streĉiĝis, kliniĝis, elŝovis sian langon, ŝrumpigis la nazon, palpebrumis per unu okulo. La spegulo imitis ĉiun lian movon.

Glano ege ŝatis la ludon. Iel tute senintence li surmetis sur la kapon la bluan kaskon de Sabalbono, surtiris la pantalonon, surpiedigis la spronitajn ŝuojn, surmetis la ruĝmakulan militjakon kaj ekpiedigis sur ĝi diversajn ordenojn kaj krucojn. Fininte la vestiĝadon, li ĵetrigardis al la spegulo kaj ne rekonis sin: antaŭ li staris brava soldato kun levita mano por milithonoro.

Glano kelkfoje militmaniere turnis sin kaj tintis kiel sako de mono. Tio tre plaĉis al li kaj li ekmarŝadis antaŭ la spegulo kel dum militparado. Kaj Sabalbono dume havis teruran sonĝon, kaj neniel povis vekiĝi. Al li aperis, ke kavaleriistoj dispecigis lian tutan armeon kaj nun kuras post li.

Vekiĝinte li longe timis malfermi la okulojn. Tamen



kia timigita li estis, kiam li ekvidis antaŭ la spegulo streĉigantan sin mem. Sabalbono refermis la okulojn kaj pro timo tiris sur la kapon la litkovrilon. Tamen la orelojn iritis tediga tintilado de multega ordenaro. La militestro singardeme pinĉis sian femuron kaj el sub la litkovrilo rerigardis al sia iranta fantomo. Nenio estis dubinda – tie iradis li mem.

“Kaj kiu kuŝas ĉi tie sub la plumono” pensis Sabalbono kaj pinĉis sian ventron. Sed eĉ pro tio la fantomo ne malaperis. Tiam la infanteriestro kun grandega furiozo ekpinĉadis sian nazon, tamen la fantomo daŭre streĉiĝadis antaŭ la spegulo.

– Gardistaro! – kriegis la kuraĝulo per nekutime streĉita voĉo.

La kriego kvazaŭ hakis brakojn kaj gambojn de Glano. Li tiel timiĝis, ke li ne kapablis movi kaj senkonscience ekkaptadis la tenilon de la sabro.

– Ne murdu! – rekriegis Sabalbono. – Forprenu ĉiujn miajn soldatojn, nur lasu min vivan, – surgenuiĝis li kaj levis ambaŭ manojn. Tia ploretado de la infanteriestro iomete trankviligis dezirantan fuĝi Glanon. Kiam alkuris la gardistaro, li estis tute subpreminta sin kaj fiere diris:

– Viroj, rememorigu tiun gapulon, kiu mi estas!

– Vi estas la sinjorego de ĉiuj faboj, al neniu komparebla Sabalboneg’–Sabalbono.

– Kaj kiu estas mi? – nenion komprenis duondormanta soldataĉo.

– Vi estas mia spirito, ombro, fantomo, kiun mi ne bezonas dum tago, – iritadis lin Glano. – Viroj, ŝovu lin en ian mallumejon ĝis la nokto, – ordonis li al la gardistoj.

– Mensogo! Tio estas perfido! Obeu miajn ordonojn! – akre kriis rekonsciiginta Sabalbono, tamen la gardistoj obeis Glanan ordonon kaj fermis sian veran reganton en subterejon.

La kverkido tiel ekŝatis esti potenca kaj ĉies honorata gvidanto, ke li pripensis moki ankaŭ sian amikon Pizeton. Kurbiĝinta sub la grandega pezo de ordenoj, li svinge iris al sia tendo kaj ekkriis per dika voĉo:

– Hej, komplotistoj, malfermu!

Pensante, ke Sabalbono malkovris ilian komploton, Rapiduleto kaptis de sur la muro antikvan pistolon kaj pafegis en ĉi movantan aron de krucoj kaj medaloj. Bonŝance la pistolo estis tre antikva, kurbtuba, aplikita por pafi el malantaŭ angulo, tial la kuglo forportis nur la kaskon de la imitanto, tiamaniere demaskigante lin.

– Tio... tio, – eĉ pli timiĝis Pizo, kaj li fartis malbone. – Ĉu ĉi tie estas vi?

– Mi, mi, kiu alia povas ĉi tie esti! – etendis la manojn Glano. – Ĉio sukcesis multe pli bone ol ni

planis. La infanteria Sabalbono jam sidas en kaverno.

– Bonege! Nun vi ordonu por la trumpetistoj blovi finon de la milito, por ke ni povu kune kun la soldatoj gaje kaj sen iaj obstakloj reveni hejmen.

– Kaj la rajdantoj? Ili estas pripensinda ankaŭ por ili, – instruece diris Glano kaj sidiĝis por ion skribi. Ĉi foje li sukcesis multe pli bone. Post duontago da laborego li tralegis al Pizo tian proklamon:

For la fiajn soldataĉojn!

For la Sabalbonojn!

Lernos ni feliĉe vivi

Sen iaj sinjoroj!

– Mirinde! – saltadis Pizo. – Mirinde!

Presinte kelkajn milojn da flugfolioj, la amikoj portis lin al la baterio de la pezaj kanonoj, ŝarĝis per ili kelkdek da plej grandaj obusoj kaj ordonis pafi ilin al ĉielo. Kiam la obusoj komencis eksplodadi, super la batalejo verŝiĝis nuboj da folioj. La soldatoj legis la proklamojn, ĵetadis aeren kepojn, ĝojis kaj kantis.

Apenaŭ aŭdiĝis la unuaj trumpetaj sonoj, infanterianoj ĵetis armilojn sur grundon kaj dum kvin minutoj diskuradis ĉiu laŭ sia volo. Ĉirkaŭe videblis neniu soldato. Ekvidinte tion ekretiriĝis ankaŭ kavaleriistoj. Ili ne konfidis la trumpetantojn kaj pensis, ke tio estis nur vica trompaĵo de la malamiko. Dum tia malordo vekiĝis la kavaleriestro.

– Kial ni retiriĝas? – kriegis li. – Kie estas mia pantalone? Kie estas mia sabro? Kie estas miaj ordenoj?

Aŭdinte la frenezan voĉon de sia estro, la rajdantoj eĉ pli energie frapis siajn ĉevalojn kaj komencis retiriĝi tutfronte. Nenion perceptante, Sabalbono volvis sin en litotukon, saltis sur neselita ĉevalo kaj terure kriegante kaj blasfemante, iel sukcesis haltigi la fuĝantojn.

– Restu samloke! Aŭ vi trovas mian pantalonon, aŭ mi vin, malkuraĝulojn mueligos en farunon. Mi montros al vi kion vi meritos pro stultaĵoj pripensitaj. Mi farunsupon kuiras el vi!

La armeo viciĝis kaj atendis estontajn eventojn. La tago jam finiĝadis, kaj Sabalbono, volvinta en litotukon, kuregis kvazaŭ fantomo tra la kampo kaj senĉese minacadis:

– Mi vin mortpafos! El vi mi oleon premos! Mi vin kiel beretojn sur agrostidon surpikos!

Ju pli la kavaleriestro furiozis kaj ju pli ne plenumadis siajn minacojn, des pli la soldatoj dubis lin.

– Kaj kie estas viaj epoletoj? – subite demandis unu rajdanto.

– Vi diru al mi, kie. Malkuraĝuloj, kanajloj, dormemuloj! – kvazaŭ tempesto koleregis Sabalbono.

– Eble li estas ia spiono, – decidis la soldatoj kaj tuj kaptis la furiozantan estron ĉe kolo.

– Mi estas via reganto! Mi estas via sinjoro!

– Tre bone, sed ni devas vin ekzameni, – diris la soldatoj kaj ordonis sian estintan estron, ke li jungu ĉevalon. Li havis nenian komprenon, kiel tion komenci. Tiam kavaleriistoj donis al li sabron kaj ordonis akriĝi ĝin. Sabalbono ekturis la akriĝilon tiel furioze, ke la sabro estis dentigita kiel segilo. La viroj jam ne donis al li la trian taskon. Ili tiris la litotukon for de Sabalbono kaj ekvidis, ke tiu estis tute ne fazeolo, sed ia ajn degenerulo.

– Kompatu, – petegis la estro. – Mi neniam plu militos.

La soldatoj ekstraktis la situon. Tiutempe super iliaj kapoj eksplodis kelkaj obusoj lanĉitaj de Glano kaj Pizo, kaj surverŝis ĉiujn per la pluvo de proklamoj.

– For la soldataĉojn! For Sabalbonojn! – ekkriis ĉiuj kavaleriistoj. Pro ĉi potenca krio eĉ la grundo ondegis sub iliaj piedoj.

Nenion atendente, la soldatoj kondukis nudan Sabalbonon al la plej granda sambuka kanono, verŝis en ĝin cent mezurkvantojn da diabla tabaka pulvo, sidigis sian eksreganton en malplanan obuson kaj pafis lin en la Lunon. Por la unua fojo la soldatoj por li tutkore kriis trifojan „hura“. Feliĉe kantante ili ekiris hejmen.

– Ni flugu al la infanterianoj! – iu propnis. – Ni kune hejmen marŝos!

Ektremis, ekbruis la grundo sub la ĉevalaj hufoj, miloj da gorĝoj kantis gajajn kantojn, dek miloj da piedoj stamfis eĉ pli gajan stamfodancon. Aŭdinte tian

bruegon, Glano kaj Pizo eliris por bonveni la rapidantajn kavaleriistojn.

– Vivu paco! – kriis Glano.

– Hura por la kavalerio! – alkriis Pizo.

Apenaŭ li tiel kriis, la kavaleriistoj forĉevaliĝis, ligis ilin kaj kondukis al la sama sambuka kanono, per kiu Sabalbono estis ĵus pafita al la Luno.

– Kamaradoj, pro kio, – ploris Glano.

– For la aĉajn soldataĉojn! – ne koncedis la kavaleriistoj. Nur nun la malfeliĉaj amikoj ekvidis, ke sur la brusto de Glano pendas multego da meritsignoj de Sabalbono kaj sur lia kapo staraĉas la kasko el blua akonita floro.

– Ni ne estas kulpaj, ni nur ŝercis. La proklamon al vi skribis mi kaj Pizo, – provis senkulpiĝi Glano.

Nenio efikis. Ĉifoje soldatoj ŝovegis eĉ ducent mezurkvantojn da diabla tabaka pulvo, sidigis la amikojn en la malplanan obuson de la kanono kaj ekbruligis la prajmon.

– Kia sendankemo! – ĝemis Glano. – Ja ni ambaŭ nur deziris bonon al vi...

Terura bruego de la pafado dampis liajn ĝemojn kaj la senenhava obuso flugis en la ĉielon.

(daŭrigota)



"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Birdoj je l'tagiĝo

Araneaĵon da steloj teksis
la nokto super la rektangulo
de mia ĝardeno.
Je l'tagiĝo birdoj
migris al la maro
dum sur la grundo mi rigardis ilin
kiel pensojn
noktajn
kaj dum ŝajne mi aŭskultis tra la branĉoj de l'pirarbo
fore fore la dancadon de l'viv-akvo
kaj ŝajnis ke sub miaj piedoj
la narciso-bulboj
iom supren puŝleviĝis kaj dorno
(tenera) de la limonarbo
iom frotis la blankecon
de l'maten-brusto gutiganta el la cisterno
kaj jen ubite la grundo
sub miaj piedoj

tradukis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

etendiĝis pli ol la hela ĉielo.

John Cremona



El la malta tradukis **Carmel Mallia**
22.2.2021

John Cremona estas malta poeto (1918-2021):



*ĉefjuĝisto kaj vic-
prezidanto de la Eŭropa
Kortumo de la Homaj
Rajtoj; verkis en diversaj
lingvoj+; verkisto de la
unua malta
sendependeca
konstitucio.*

Tuj post la jarfinaj festoj mi vizitis samideanon la bokalojn, mi alportis bieron. Ni priparolos vian situacion esence!

Mikaelon, kiun mi trovis plorantan.
– Hej, amiketo, mi salutas vin! Kio okazis al vi? – mi ĉirkaŭbrakis samideanon.

– Mi tre tre kompatas la homojn, ili estas tre malfeliĉaj, ili ne scias, kiel vivi, ili dronas en sufero, malsanoj, malfeliĉoj...

– Kara amiko, nu vi donas..., rekte estas vi Dio, zorganto de la mondo, ĉagreniĝanta pri la sorto de mortuloj, – malsukcese mi provis ekŝerci.

– Mi eĉ min kompatas. Mi ne vidas la sencon de la vivo..., mi kredas nenion..., min nenio interesas, eĉ Esperanto ne plu..., mi mortas..., – Mikaelo ree profunde singultis, ĝemploris.

– Amiko mia, kunulo, ne ploru vi, mi petas... Prefere konfesu vi, kio kaŭzis tian malbonan vian humoron. Kio okazis, karulo? – pridemandadis mi amikon.

Mikaelo forviŝis larmojn per maniko, ekrigardis malproksimen, poste min, kaj diris:

– Min forlasis edzino.

– Nu jes, tio ĉi estas afero alia, pli grava..., sed vi – „homoj“, „la senco de la vivo“..., rekte vi diru, ke vi estas perfidita kaj forlasita, – mi mem eksentis min maloportune.

– Do kiel mi vivu plu? Mi tre hontas..., kion la homoj parolos, – denove ekploris Mikaelo.

– Ne gravas, kion la homoj parolos pri vi... Oni parolis, parolas kaj parolos. Ne nervoziĝu! Tia estas la vivo. Pro kio vi devas honti? – kontraŭdiris mi. – Ĉiokaze hontu ŝi, ke vin forlasis. Mi pensas, ke ŝi streĉigas la situacion. Ludas ŝi, provante kompreni, kion ŝi povas atingi.

– Mi al nenio taŭgas, – ree ekploris Mikaelo. – Mi ne sukcesis ŝin savi....

– Vi malveras, vi estas bonulo, viveca, verkema, aktivulo en la kluba agado, vi ne kulpigu vin, ĉi tie, verŝajne, estas aliaj kaŭzoj... Vi sciu, ke ĉiu fino estas la komenco de io nova. Ekrigardu vi vian situacion pozitive. Vi restigu vian pasintecon kaj komencu la novan parton de la vivo, – mi konsolis samideanon.

– Facilanime vi parolas. Mia koro sangumas, sed vi..., – ofendiĝis Mikaelo.

– Bone, amiketo mia, mi kompatas vin, – mi kunmetis miajn polmojn kaj komencis vei:

– Ho kiel mi kompatas vin, kiel kompatas, ho, ho, ho...

– Vi, vi ne mokridu min, – ekkoleris Mikaelo, – restigu min en pacienco...

– Tio jam ne estos! Ĉu mi restigu vin sola dum la malfacila tempo de via vivo? Ne ĝisatendos vi!... Portu

la bokalojn, mi alportis bieron. Ni priparolos vian situacion esence!

Mikaelo alportis bokalojn, tranĉpecigis fromaĝon kaj iom trankviliĝis.

Mi malŝtopis la botelon da biero kaj plenigis la bokalojn. Ni gustumis la bieron, ĝi estis malvarma kaj bongusta. Post ioma paŭzo Mikaelo komencis rakonti:

– Ĉio komenciĝis antaŭ la jarfinaj festoj. Kiel kutime, antaŭ la festoj mi sidis ĉe komputilo kaj dissendadis la festgratulojn kaj bondezirojn al miaj geamikoj. Ŝi venis al mi kaj diris: – „Vi tute ne atentis min! Mi enuas.“

Mi interrompis mian komputiladon kaj returniĝis al ŝi. Staris ŝi antaŭ mi kun taŭzitaĵoj kaj okuloj ardantaj pro la kolero, kun levita ĉerpilo enmane. Ŝia sinvestiĝo estis stranga – verdire senvestiĝo. Bela kaj terura ŝi aspektis. Mi tre timas policon, sed edzinon, mi konfesas, timas mi dufoje pli forte. Fine ŝi diris: – „Do elektu vi: mi aŭ via Esperanto!“ Mi diris al ŝi nenion, kaj ŝi ankaŭ nenion diris pli. En profundo de la koro mi sentis min kulpa. Unu tagon poste ŝi kolektis siajn aĵojn kaj foriris..., – ree ekploris Mikaelo.

– Al kiu ŝi iris? – ekinteresiĝante demandis mi.

– Al tiu kantisto..., Dominiko, – honteme diris Mikaelo.

– Al tiu viransero?... Tiu drinkemulo?, – tre ekmiris mi.

– Nu, jes... – kaj eĉ li mem ekmiris.

– Do li estas tute gapa, fiaktoro el la teatro de degenerintoj. Ĉu eble la kapo de via edzino perturbas? Eble ŝi kapon sian frapuŝis? – plue mi pridemandadis la amikon.

– Mi ne scias..., ŝi diris, ke lin amas..., – kun larmoj en la okuloj parolis Mikaelo.

– Vi sciu, amiko mia, ke mi senreviĝis je via edzino. Ŝi tute ne meritas vin. Foriru ŝi kaj ne revenu. Brave!, – mi kelkfoje frapetis permane lian ŝultron.

– Vi tiel opinias? – post eta paŭzo demandis Mikaelo.

– Kompreneble; ĉe vi estu festo, sed ne funebro! Ni levu bokalojn! Estu vi libera. Vivu kaj ĝoju, ke vi foriĝis de via edzino, posedanta tian malbonan guston kaj percepton! – argumentis mi.

Ekscitita de tiu ĉi forta argumento, Mikaelo elradike ŝanĝiĝis. Ni glutis iom da biero.

– Eble vi pravas, – ekpensis Mikaelo, – ĉu mi mortigu min nur pro tio, ke mia edzino perdis percepton kaj bonan guston? Iru ŝi sur ...!!! – forte eksakris li kaj finfine unuan fojon ĉivespere ekridetis. – Mi jam dum kelkaj tagoj ne vidis ŝin kaj mi jam opinias, ke tio ĉi ne



plu koncernas min. Eble mi eraras, tamen mi sentas min trompita, – finis li.

– Kompreneble, kaj iru ŝi kun sia viransero, tiu seksemulo eĉ pli foren, transhorizonten, – ekridetis kaj mi. Poste ni denove gustumis la bieron, la fromaĝo ankaŭ bongustis.

– Sed, atendu vi, kiel ŝi, posedante tian malbonan guston kaj percepton, vivis kun mi tiom multe da jaroj? – ekdemandis serioze Mikaelo.

– Aŭskultu, amiko, tiam ŝi ankoraŭ ne estis frapinta sian kapon, la cerbo funkciis bone kaj la percepto estis enorde, – mi klarigis la aferon.

– Do eble sukcesos ŝin sanigi? – ekdubis

Mikaelo.

– Dubinde. Eble sanigos ŝin nur tiu drinkulo, batemulo, tiu seksemulo kantisto... ĥa, ĥa, ĥa... ĥo, ĥo, ĥo..., – beste laŭte ridis mi.

– Malfeliĉas mia edzino, mi tre kompatas ŝin... Kiom multe ŝi devos suferi, ĝis ricevos bonan guston kaj percepton, – konfuziĝis Mikaelo. – Ĉu mi kabeiĝu? Jen dilemo!

Mi havis ion por diri al samideano, sed ĉimomente eksilentis. Mi fintrinkis bieron, dankis al amiko kaj adiaŭis.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo

Malrapidiĝu!



La komenco de nova jaro ofte memorigas al ni, ke la tempo pasas tre rapide. La studentaj jaroj ŝajnis finiĝi tuj. Poste oni apenaŭ palpebrumis, sed jam la propra bebo fariĝis adoleskanto. Oni levas la kapon de la skribotablo por trovi, ke oni faras la saman laboron jam de dek jaroj. Estas timige, kiel rapide la vivo pasas.

Ne helpas, ke la plej grandan parton de nia vivo ni vivas senkonscie. Estas multaj agadoj, kiujn ni faras aŭtomate. Ĉu vi vere atentis kiam vi brosas viajn dentojn, manĝas aŭ vestiĝas? Estas bona afero, ke iuj aferoj okazas aŭtomate. Oni estus elĉerpita, se necesus konstante pensi kiel spiri aŭ marŝi, aŭ kiel veturigi aŭtomobilon. Tamen ekzistas aliaj okazoj, kiam oni prefere malrapidiĝu por ĝui la momenton: ekzemple kiam oni ferias ĉe la marbordo. Aŭ kiam oni pasigas tempon kun amato.

Estas aferoj, kiujn ni povas fari ĉiutage por malrapidigi la vivon.

1. Faru ŝanĝojn. Unu kialo, pro kiu la vivo ŝajnas pasi rapide, estas ke oni ne atentis. La cerbo ne bezonas multe labori kiam temas pri aferoj, kiujn ĝi faras ree kaj denove. Oni ĉiam parkas en la sama loko ĉe la laborejo. Oni manĝas ĉiam la saman tagmanĝon, aŭ promenas ĉiam laŭ la sama vojo. Malgrandaj ŝanĝoj tiras la atenton reen al la momento. Aĉetu ĉe malsama vendejo. Ŝanĝu la guston de via kafo. Mendu

vespermanĝon de nova restoracio.

2. Provu novan ŝatokupon. Esti nova lernanto faras mirindajn aferojn por la cerbo. Kiam oni lernas ion novan, kiel ludi instrumenton, fari sporton aŭ lerni lingvon, la cerbo kaj korpo tre forte koncentriĝas. Anstataŭ fari movojn, kiujn la korpo jam bonege konas, necesas pensi pri ĉiu movo, ĉiu vorto, ĉiu noto.

3. Renkontu novajn homojn. Eble estas iu ĉe via laborejo, kiun vi ne tre bone konas, aŭ najbaro, kun kiu vi neniam babilis. Aŭ vi povus aliĝi al malsama preĝejo, sporto-teamo aŭ Esperanto-klubo. Renkonti novajn homojn aldonas riĉecon kaj diversecon al la spertoj, kaj devigas vin koncentriĝi. Vi ne konas iliajn historiojn. Vi ne scias la nomojn de iliaj infanoj kaj geamikoj. Kiam ili parolas, necesas atenti por povi lerni pri ili.

4. Atentu pli pri la ĉiutagaj agadoj. La venontan fojon kiam vi lavos telerojn, faldos vestaĵojn aŭ balaos la plankon, atentu ĉiun detalon. Kion vi vidas? Kion vi aŭdas? Kiel vi sentas la akvon ĉe via haŭto? Kiel odoras la pura ĉemizo? Observu ĉion.

Ni ne povos haltigi la tempon, sed ni povas intence malrapidigi ĝin per pli aktiva koncentriĝo pri la mondo ĉirkaŭ ni.

Myrtis Smith

Pri la verkinto

Myrtis Smith estas usona esperantistino, inĝeniera instruisto tage kaj aspiranta artisto nokte. Ŝiaj ŝatokupoj inkluzivas verkadon, dancadon, kudradon, marŝadon kaj, kompreneble, Esperanton.

Novaj Vortoj

adoleskanto: junulo inter proksimume 12 kaj 18 jaroj.

aŭtomate: maŝine, sen homa direktado; agante senpense, kvazaŭ oni mem estus maŝino.

balai: forigi malpuraĵojn sur la planko per ilo, kiu forpuŝas ilin.

bebo: tre juna infano.

>>12

Memore al DAWUD MALEK, DAWUD MUSTAFA kaj al ĉiuj viktimoj de la grandaj fajroj de la 10-a de AŬGUSTO 2021.

Neniu povos forgesi tiun malutilan tagon de la 10-a de aŭgusto 2021. Ĝi neniam elmemoriĝos de la Kabila memoro ĉefe ĉe la loĝantoj de la vilaĝo Iŝliĝen situanta en la urbo de Larba Nat Iraten, provinco de Tizi Uzu, en Alĝerio. Neniu povis prognozi tian tragedion dum tiu varmega somero. Krom la manko de trinkebla akvo kaj la sanokrizo pro Kovim, ĉio estis bona aŭ preskaŭ. La homoj sin okupis en tiu enklava vilaĝo, kie estas nenia distraĵo. Iŝliĝen, kun siaj 400 loĝantoj, konsistas el 4 vilaĝetoj; Taurirt, Lala, Agulmil, Matuk, Sankta Jusef.



Kiel ĉiuj vilaĝoj de Kabilio kie precipas la mont-agrikulturo, la ununura rimedo de tiu vilaĝo estas la olivarbo, tiu miljara arbo de la Romia epoko. Granda mizero apogeas kaj la plimulto de familioj foriras al urbo aŭ eksterlanden, ĉefe Francujo. Ĉi tiun jaron, la somero estas severa kaj la manko de akvo komplikas la vivon, interalie dum tiu sano-krizo de Kovim, kiu mortigas ĉiun tagon tra la mondo. Ni estas komence de Aŭgusto, junulino mortis pro tiu pandemio. Granda konsterno okazis ĉe la vilaĝanoj. Sed neniu imagis, ke la plej malbona estas venonta kaj granda tragedio trafos la vilaĝon kaj la regionon. Tio ne malfruos.

Dum la tago de la 9-A de aŭgusto, granda fajro okazis en la najbaraj komunumoj; Beni Duala kaj Beni Jeni. La saman tagon, vespere, la fajroj atingis vilaĝojn apud ni; Taŭrirt kaj Ait Atelli. Kelkaj domoj brulis, la loĝantoj de tiuj vilaĝoj foriris al la ĉefurbo. Nokte, la fajroj estis pli malpli regitaj. Ni kredis ke ĉio estis en ordo, do ni dormis. Malbona Eraro! La fajro reprenis kaj direktiĝis al nia vilaĝo. Mia patrino min vekis, dirante ke la fajro estas ĉe niaj pordoj. Necesis foriri kiel eble plej rapide! Estis la 2-a horo matene, estis mallumo ĉar la elektro elŝaltiĝis. Mia patrino ploregis ĉar ŝi timis pro nia domo. Rapide kaj tremante, mi kunprenis miajn ŝparaĵojn kaj mian kanon ĉar mi estas handikapulo. Ne estas vortoj por priskribi tiun scenejon. Homoj kuniĝis

sur la vilaĝplaco atendente ajnan helpon. Veturiloj iris kaj venis por eporti familiojn, infanojn, virinojn, gemaljunulojn. Necesis malplenigi la tutan vilaĝon ĉar la fajro proksimiĝis. Meze de ploroj, krioj, preĝoj, oni foriris forlasante domojn, bestojn detruotajn pro flamoj.

Mi, mia patro trafita de Kovim, mia patrino, mia frato kaj lia edzino, ni eniris en la veturilon de mia juna frato. Sur la vojo, estis granda procesio de veturiloj. Familioj forlasis domojn, brutaron kaj posedaĵojn. La vento estis fortega, sendube tio disvastigis rapide la fajron tra la tuta regiono. Kiam ni alvenis al la vojeto kiu kuniĝas al la ĉefvojo, mia juna frato elektis iri al la Familia Centro situanta en la komunumo de Ait -Aguaca, apud de nia vilaĝo. La gardistoj direktis nin al unu el ĉambroj de tiu centro. Mi memoras: ĝi estis la 23-a. Mia juna frato revenis al la vilaĝo por helpi miajn aliajn fratojn, kiuj restis tie por estingi la fajron. Cetere, estis danke al ili kaj aliaj junuloj, ke multo da domoj kaj homoj estis savitaj.

La komunumo de Ait-Aguaca estas malgranda municipo, situanta proksime de nia vilaĝo. Ĝi havas urbodomon, kelkajn venejojn, domojn, kies plimulto estas ĵuse konstruitaj. La ĉefstrato estas mallarĝa, sinusa kaj dekliva. La centro, kie oni loĝis, situas ĉe la eniro de tiu urbeto. Ĝi apartenas al la oficejo Sonelgaz (Nacia kompanio de gaso kaj elektro) kiu akceptas funkciulojn, kiuj venas pasigi feriojn kun sia familio, ĉirkaŭita de belaj arboj, vere pentrinda. Oni spiras puran aeron kaj ripozas trankvile. Ĝi estas ĉirkaŭita de murego, pordego fermas la eniron, kie gardisto gardostaras kaj akceptas la vizitantojn. Interne, estas granda korto plantita per belaj arboj. Kiam oni trairas tiun grandan korton, ni estas antaŭ la domo, kiu konsistas el pluraj ĉambroj. Ĉiu komforta ĉambro havas ĉiujn oportunaĵojn. Tie oni loĝis en la ĉambro 23-a. Aliaj fuĝantoj okupis aliajn ĉambrojn. Oni ripozis bone. Matene, la Centro servis al ni kafon, akvon, kukojn. Ni dankas ilin pro tio. Tagmeze, ni provis kontakti la fratojn, sed i ne sukcesis ĉar la reto ne funkciis. Ni ektimetis. Ni havis nenan novaĵon pri nia familio kaj vilaĝo. Kio okazis? Mia patro suferanta pro Kovim, havis plenan ripozon. Mi donis al li la kuracaĵon. Ĝis tiu momento, ĉio estis bona. Oni esperis rehejmiĝi kiam tiu malbona fajro ĉesos kaj tiel ĉio reordiĝos. Ĉefe mi esperis spekti tiun faman piedpilkan finan ludon de la alĝeria trofeo inter nia klubo J.S.K kaj FC Magra, klubo situanta oriente de Alĝerio, kiu okazos tiun tagon, la 10-an de aŭgusto. Ve! la Sorto alie decidis. Mi neniam vidos tiun ludon!

Je La 14-a horo, kiam tuto kvietiĝis, subite, ni aŭdis kriegojn devenantajn de la koridoro. Nekredeble!

Kvazaŭ iu ekfrenezus! Mia patrino ekkuris ĝis la pordon, malfermis ĝin; neniu en la koridoro. Kio okazas? Sentante ajnan danĝeron, ni ĉiuj ellitiĝis, eĉ mia patro kiu suferis. Subite, oni elkriis : Eliru! Eliru! Oni demandis la kialon, tiu respondis : Eliru! mi petas vin, Eliru! Tiu pravis ĉar la fajro proksimiĝis. La fajro estis en la granda korto! Ĝi trafis la ĉefurbon, la centron! Ĉiuj eliris, mi estis la lasta. Mia patrino helpis mian patron. Malfacile, per mia kano, mi malsupreniris la ŝtuparojn. Kuri, mi ne povis. Mi marŝis pene. Kiam mi alvenis al la korto, la fajro estis tie, malantaŭ mi. Ĝi atakis la belajn arbojn. Miaj piedoj kaj dorso min doloris pro longa marŝado ĉar mi ne kutimis tion. Ĉefe mi ne povis spiri pro la fumo. Mi haltis ĉar mi timis fali teren. Estis neniu en la korto, ĉiuj foriris. Mi nenion povis fari krom atendi. Kion? Helpon aŭ morton! Mi faris kelkajn paŝojn al la pordego. La gardisto estis fermanta ĝin. Mi sufokiĝis. Kio estas tiu fajro? apokalipsa fajro, kiu antaŭeniras rapide konsumante ĉion sur ĝia pasejo; arbaroj, domoj, bestoj, homoj. Vilaĝoj fajriĝis unu post la alia. Oni aŭdis la bruon de flamoj, kiuj kriegas kiel vulkano. Mi neniam vidis tian fajron ! Mi spiris malbone kaj penige.

Subite, Miraklo! Mia patrino revenis kaj petis al la gardisto malfermi la pordegon. Ŝi eniris kaj helpis min. Kiam ni estis ekstere, la tuta urbeto estis kovrita de fumo. La atmosfero estis nespirebla. Granda procesio de veturiloj. Oni penis forkuri ien ajn. Virinoj kriis, ploregis. La loĝantoj de tiu urbeto eliris kaj foriris, forlasante ĉion. Tiu infera fajro ĉirkaŭigis nin de ĉiu flanko. Meze de tiu homamaso nesciante kion fari, serĉante ajnan savon, preĝante Dion, mia patrino vekis transportanton, kiu estis apud ni. Oni eniris tiun veturilon, kie estis pasaĝeroj, pretaj iri ien ajn, for de tiu apokalipso. La kondukisto sin direktis al (**El Miser**), vilaĝo situanta pli malalte de tiu komunumo. Tie esis kelkaj loĝantoj el nia vilaĝeto. El Miser vigliĝis. Ĉiuj estis tuj forirontaj. Oni ripozis en la lernejo de tiu vilaĝo. Tie ni eksciis la malbonan novaĵon; pluraj mortintoj kaj vunditoj en nia vilaĝo. Ĉu tio estas vera? Morta silenco regis. Oni aŭdis nur tiun timigan grincon kvazaŭ giganta buŝego mordus en ligno de la arbaro poste dispremus ĝin. Vastegaj kampoj brulis. Ni sentis tiun strangan odoron el fajro kiu proksimiĝis. Ve! la danĝero estis tie. Homoj revenintaj de la ĉefurbo diris ke la fajro proksimiĝis kaj baldaŭ trafos la vilaĝon ! Necesis foriri kiel eble plej baldaŭ kaj plej rapide ! Estis granda problemo ; Mi ne plu povis kuri ĉar miaj piedoj min doloris kaj ĉefe mi laciĝis. Ankaŭ mia patro ne povis pro la malsano. La loĝantoj de tiu vilaĝo ekforiris. Ni kaj la aliaj atendis ajnan savon ! granda momento pasis. Subite, surprizo ! jen junulo de nia vilaĝo kiu venis en sia kamiono por transporti sian familion kaj najbarojn,

kiuj estis tie. Ni ĝojis ĉar ni pensis ke ni estis savitaj. Granda Eraro!

Kiam mia patrino petis de li kunkonduki nin, li rifuzis. Malgraŭ la petegojn de mia patrino, li ankaŭ rifuzis ! Ni ne kredis tion ! Forlasi nin en tiu infero, estis krimo. Ĉu tiu homo havas konsciencon? Mi ne pensas. Blokitaj en tiu vilaĝo meze de fajro, lacaj kaj senesperaj, ni atendis. Feliĉe, ni ne estis solaj en tiu vilaĝo kie la loĝantoj estas afablaj. Oni estis tuj perdontaj la esperon, kiam, neatendite, buso alvenis. Oni ĝojis ĉar tiu buso estis sendita de la Oficejo de tiu komunumo por venigi nin. Savitaj! Almenaŭ por tiu momento. Ni eniris. La buso aliris nian ĉefurbon, Larba Nat Iraten. Sur nia vojiro, oni vidis vastegajn olivarbojn kaj domojn bruli, ruĝetaj flamoj konsumi arbojn. lafoje, kelkaj langoj de fajroj kiuj ŝprucis poste refalis. Kiam ni alvenis al **Abudid**, vilaĝo situanta pli alte en nia regiono, oni vidis veturilojn kaj kamionojn kalcinitajn, homojn estingantajn la fajron ĉirkaŭ siaj domoj. Nekredeble! Ĉu estas filmo, koŝmaro aŭ realeco? Kio estas tiu fajro kiu disvastiĝas rapide konsumante ĉion sur ĝia pasejo? Ni alvenis ĉe nia ĉefurbo, kie mia fratino kun sia edzo atendis nin veturile. Volante reveni hejmen al nia vilaĝo, ni ne sukcesis ĉar policistoj fermis la vojon. Oni diris al ni ke la vilaĝo estas izolita. Oni komprenis, ke ia malfeliĉo trafis nian vilaĝon. Feliĉe estis mia fratino ĉe kiu ni tranoktis. Tie ni ripozis. La sekvantan matenon ni revenis al nia vilaĝo. Tra la ĉefvojo, homoj prizorgis estingi la lastajn fajrojn. Kiam ni alvenis al la vojeto, kiu kuniĝas kun nia vilaĝeto, ni trovis la hororon !

Hororo en la vilaĝo – Elektraj kabloj falis teren, kampoj tute brulintaj, kelkaj veturiloj kalcinitaj. Enirante al nia vilaĝo, oni devas trapasi la unuan vilaĝeton, Agulmim, kie procesio de veturiloj parkiĝis sur la vojeto. Kio okazis ? Kial tiu procesio ? Loĝanto de tiu vilaĝeto diris ke, malfeliĉe, estis mortintoj kaj gravaj vunditoj en tiu vilaĝeto! Nekredeble! Hororo! Do tiu infera fajro mortigis homojn! Homoj mortis dum tiu malutila tago, la 10-an de aŭgusto 2021 ! Gravaj vunditaj en la malsanulejo. Senesperaj, ni daurigis nian aliron al nia vilaĝeto, la koro rompita . En nia vilaĝeto kaj vilaĝo-, estis nek akvo, nek elektro. Teruro furiozis sur nia vilaĝo, nia urbo, nia regiono, la tuta Kabilio! Ĉesis la vivo kaj la morto triumfis. Ĉio mutas ! Kampoj, bestoj, homoj, domoj, ĉio brulis. Nenia herbo postrestis, kvazaŭ iu senherbigus ĉion. Ni havis nenian manĝaĵon kaj akvon. Feliĉe, loĝantoj de la najbaraj Provincoj provizis nin per manĝaĵo, akvo, kuracaĵoj, vestoj, eĉ mono. Malfeliĉe, okazis tro da ŝtelo kaj friponaĵo. Oni pasis la unuan nokton sen ia incidento. La vilaĝanoj gardostaris ĉar ni timis, ke la fajro revenos. La morgaŭo, matene, estis granda konsterno

en la vilaĝo kaj en la tuta regiono. La nombro de mortintoj estis 19. Unu el ili estis mia onklo. Ĉiuj tiuj mortintoj loĝas en Agulmim, krom mia onklo. Multe da vunditaj kiuj oni transigis al faka malsanulejo, en la ĉefurbo, Alĝero. Iuj mortos pli poste. Unu el ili, Daud Malek, mortis pro gravaj vundoj, provante savi junulinon. Li estis en sia veturilo. LA 18 mortintoj de Agulmim estis enterigitaj en la placo de tiu vilaĝeto ĉar oni konstruos Steleon memore al ili. Mia onklo kaj Malek, estis enterigitaj en la tombejo de ilia vilaĝeto, **Sankta Jusef**. En tuto la Kabilio, la fajroj mortigis pli oli

200 homoj, detruis domojn, bestojn, kampojn, veturilojn. Maljunuloj de nia vilaĝo asertas, ke ili neniam vidis tian fajron eĉ dum la kolonia epoko. franca okupado.

Por fini, mi citos la poemon de la fama alĝera kaj kabila kantisto IDIR;

*Ho tero de malfeliĉoj, neniu bonstatas
La tempoj nin perfidas, kvazaŭ ni estas damnitaj.*

verkis kaj sendis **BELMILUD AHMED** el Alĝerio

ĈIELA VORDONISI (2)

Tiu universo, kiu estas unu el tiuj vi konas - kaj kiun vi ne povas vidi per la nuda okulo – daŭris kun la interplektiĝo de senlimaj spiraloj kaj tiel formiĝid Ĉiela Vordonisi. La terpecoj kaj rokoj, kiujn mi rakontis en la antaŭa ĉapitro estas el la tempo multe pli antaŭ de la formiĝo de la homa civilizacio de Vordonisanoj. Tiam estis lumkorpaj estaĵoj. Mi diris korpo, sed ne same al la ordinara homa korpo... En la Ĉiela Vordonisi estis estaĵoj, kiuj vagadis kelkaj en formo de elipso, aliaj en formo de cirklo, linio kaj poli-linioj, sed la lumo ili radiis estis sufiĉe malalta. La loko ankaŭ estis malluma kaj flosanta insulo. Liniaj, cirklaĵ, kurbaj aŭ rompitaĵ-liniaj kaj punktaĵ estaĵoj okupiĝis en milionjara milito. Pli apartaj kaj pli proksimaj formoj al tio, kion ni vidas hodiaŭ, aperis post ĉi tiu luktado. Diagonaloj deklaris militon kontraŭ la kurbaj, torditaj, cirklaĵ formoj. Punktoj kun 'hodaŭnekonataj' koloroj apogis la cirklaĵ formojn en tiu milito. Ili ĉasis unu la alian inter la mallumaj rondoj, kiuj estis interplektitaj kaj preskaŭ englutitaj; Ili moviĝis supren kaj malsupren, pluen kaj reen.

Devgen, la gvidanto de la diagonaloj, estis kruela formo el interligitaj horizontalaj kaj vertikalaj linioj. La nura fleksebla aspekto de ĝi estis, ke ĝiaj linioj povis malfermiĝi kiel lancoj aŭ flugi kaj frapi kiel sagoj. Ĝi daŭre reproduktiĝis kaj naskis idojn. Sed la formo de ĝi mem kaj ĝia idaro estis ĝenerale stabila. Ĝia moviĝebleco ne estis tiom, kiel la elipsoj, cirkloj kaj punktoj. La ĵaluza kaj kruela Devgen kutimis pafi kaj absorbi elipsojn kaj cirklojn, provante artikigi ilin per siaj propraj linioj. Pulvoraj punktoj ankaŭ ricevis sian parton de tio. Sed ili ĉirkaŭvagis en malordo, kaj kiam ili havis la ŝancon, ili kunfandiĝis en elipsojn kaj cirklojn. Ĝi estis la frateco de punktoj kaj cirkloj.



Devgen kutimis etendi unu el siaj gigantaj linioj kiel lanco, dispecigis iun elipson, kaj ĝiaj idoj rektigis la apartigitajn pecojn pere de frapadoj. Punktoj, aliflanke, kutimis alkroĉiĝi al diagonalaj formoj kiel formiksvarmo aŭ abelnubo, provante cirkligi ilin. Tie estis sceno de senfina movado...

verkis kaj sendis Konural Sunal el Turkio

Ĉi tio daŭris milionojn da jaroj kaj fariĝis miliardoj da jaroj. Lun tagon en la ĉiela historio de Vordonisi, grandega maso de lumo el la preter universo alvenis kaj absorbis ĉiujn liniojn, cirklojn kaj elipsojn. Jes jes ĝi suĉis ilin, englutis kaj aldonis ilin al si. La tuta Vordonisi-galaksio iĝis hela sfero. Ĝi flagris, flagris, flagris en la mallumo de sia propra universo...

Poste aperis makuloj; helaj kaj malhelaj makuloj. La lumo dividiĝis en malsamajn tavolojn. Formiĝis formoj, kiuj ne povus enfermiĝi en la imagpovo kaj peniko de pentristo. Kelkfoje grandegaj, kelkfoje etaj. Poste voĉoj formiĝis kaj la unuaj konversacioj komenciĝis. La makuloj kiuj amis unu la alian unue flustre, poste parolante iom pli laŭte alproksimiĝis. Amasoj da makuloj moviĝis super la grandega Ĉiela Vordonis, babilante. Ili estis kiel bakterioj, kies movojn oni povas vidi pere de mikroskopo.

La plej lastatempaj Vordonisanoj tiel konis la Vordonisian Praan Historion, kiu unue ekloĝis en la ĉeloj de iliaj unuaj humanigitaj praŭloj kaj tiel estis transdonita de generacio al generacio, kaj pli poste pere de la hodiaŭa lingvo. Ĉi tio estis la komenco kaj la eterneco de militoj kaj paco, lingvo kaj komunikado, kiuj daŭre okazas hodiaŭ. La poetoj de Tera Vordonisi kutimis rakonti tiun historion kiel jene:



Tempo, la nekomprenebla
Pli maljuna ol la steloj.
Praaj estis la bataloj,
Eĉ de skriboj kaj paroloj

Estis linioj kaj punktoj
En la senĉesaj bataloj.

Enkorpigis ilin ĉiujn
Kiam venis la lumego.

En lumsfero novaj formoj,
Nekonataj nun makuloj,
Parolis en diverslingvoj,
Ili dise amasiĝis.

Mi rakontos la flosantajn kaj
nebulajn homajn, bestajn kaj
plantajn korpojn en la sekva ĉapitro.

verkis kaj sendis **Konural Sunal**
el Turkio
POETO DE VORDONISI

Ŝercoj

VUNDITA!

Kruko parolas al eta Joĉjo: Neniam forgesu ke ni vivas en timiga, danĝera mondo.

Joĉjo: Ĉu?

Kruko: Foje, la aĵoj kiujn oni plej ŝatas povas surprize vundi onin!

Dirante tion, Kruko levas sian montrofingron. Sur ĝi estas granda pansaĵo.

Joĉjo: Kio okazis je via fingro, paĉjo?

Kruko: Mi tranĉis al mi la fingron je picoskatolo!

* * *

MEMMALKOVRO

Aleĉjo, la juna bofrato de Kruko: Mi ne sukcesas havi amrilaton. Sed tio estas en ordo, ĉar tio donas al mi pli da tempo por memmalkovro.

Kruko: Tio estas tre saĝa eldiro. Do, kion vi malkovris pri vi?

Aleĉjo: Ke mi volas havi amrilaton.

* * *

ĈU VI BONE DORMIS?

Baniko alvenas, li aspektas laca: Mi ne tre bone dormis ĉi-nokte.

Kruko: Kial vi diras tion?

Baniko: Ĉar mi ne atendis ke mi vekiĝos ĵaŭde matene je la 6a horo!

Kruko: Hodiaŭ estas vendredo! Vi dormadis pli ol 24 horojn!

Baniko: Ĉu vere? Ho, en tiu okazo, mi tre bone dormis.

tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com




Arkokrucenigmo

Kaŝitaj estas kvar nomoj de manĝeblaj naturproduktoj.

Dekstren al la centro: 1 – Virnomo (de multaj reĝoj). 2 – Granda ronda ligna vazo. 3 – Metala vesto de aŭtomobilo. 4 – Dolĉa tropika frukto. 5 – Apudmara. 6 – Publika diskutejo. 7 – Inkolino al timo. 8 – Ŝlosaparato. 9 – Specialisto. 10 – Estonto. 11 – Ĉeno por malliberuloj. 12 – Komerci, entreprenadi por monprofito. 13 – Granda dancamuzo. 14 – Malgranda surbicikla aŭ surĉevala seĝo. 15 – Rajto je laŭdo aŭ rekompenco. 16 – Disketoforma fermilo (kuntenuilo) de vestoj.

Maldekstren al la centro: 1 – Kvalito, faranta ion admirinda, plaĉa. 2 – Rapidege paŝi. 3 – Batita persono. 4 – La unua kaŝvorto. 5 – Nobela titolo. 6 – Kapkovrilo. 7 – Desinfektilo (C6H5/OH/). 8 – La dua kaŝvorto. 9 – Longnaza heroo en dramo de E. Rostand (fonetike). 10 – Parto de kruro. 11 – Agema, laborema. 12 – La tria kaŝvorto. 13 – Vivejo de la animaloj. 14 – Blankŝela foliarbo. 15 – Parteto de sago. 16 – La kvara (lasta) kaŝvorto.



Fonto: Semajno de Enigmoj #8
<http://www.semajnodeenigmoj.com>
(La solvo troviĝas en paĝo 31)

Monologo de saĝa virino

Amikino Anna iam rakontis: ŝi konatiĝis kun du bonaj junuloj, amikoj. Ambaŭ saĝaj kaj bonkoraj, ambaŭ tre plaĉis al ŝi, ankaŭ ŝi al ili... kaj do? Ili ne povis "disdividi" ŝin, do forlasis. Ja "vira amikeco" pli valoras. Tio nomiĝas "nobleco". Aŭ, esence, stulteco, ĉu ne? Oferti vivajn sentojn al seka morallo, elpensita antaŭ jarmiloj de mi-ne-scias-kiu, kiam la tuta vivo de homoj estis tute alia. Nu, pensu oni: kial siajn gefratojn kaj gefilojn oni amas, sendepende kiom da ili estas; tamen se virino aŭdacas ami samtempe du virojn – oni tuj trovas por ŝi multajn aĉajn vortojn, eĉ tute nenion sciante pri la cirkonstancoj...

Ĉu eblas tuj de la unua rigardo taksi homon, kaj kompreni, ke jen li estas la sola taŭga por vi, por tuta vivo? Ne eblas ja. En vendejo vi rigardas kelkajn robojn, prove surmetas, atente esploras... Sed homo ja estas pli komplika objekto ol robo, kaj restos kun vi pli longe...

La vivo senfine varias, ne ekzistas samaj homoj kaj samaj situacioj, ĉiufoje oni pensu aparte, sed ne apliku ŝablonojn. Kiu diris, ke ne eblas ami du virojn samtempe? Eblas ja – se ambaŭ tion meritas. Sed certe ne eblas ami ilin egale – ĉar ĉiuj homoj estas diversaj...

Jen estis Petro. Bonega homo, mi sincere amis lin, naskis filon. Sed, laboraj devoj... ni longe vivis en diversaj lokoj, neniu el ni povis oferi ŝatatan laboron por transloĝiĝi... Monatoj de disiĝo, tiom malfacile eltenebla junaĝe... Li mem komprenis, ke absoluta fideleco ne eblas en tiaj kondiĉoj. Kaj mi ne kaŝis de li mian "romantikan aventuron", rakontis poste ĉion. Ĉu li pardonis min? Nu, eĉ ne temis pri pardono: simple laŭ li mi faris nenion riproĉindan. Li diris: "Mi amas vin, do mi volas ke al vi estu bone. Do mi ĝojas, se la bonon, kiun – momente aŭ ĝenerale – ne povas fari mi, faros al vi iu alia..." Kaj poste mi eĉ pli amis Petron – ĉar lia amo al mi superis viran egoismon... La vivo daŭris... ĝis tiu terura akcidento en lia ekspedicio...

Georgo. Ankaŭ bona homo. Filino naskiĝis. Sed li pli kaj pli kredis, ke edzino estas proprajo de viro. Mi tiel ne povis... mi volis esti ne sola kaj samtempe libera. En nia junaĝo oni ankoraŭ instruis, ke libero nepre enhavas respondecon pri siaj agoj. Ne kiel nun... Sed li tamen ne komprenis. Do – li restis sola. Sen edzino, sed kun flegata memfiero. Certe li poste provis iel aranĝi rilatojn kun aliaj virinoj, tamen sensukcese. Ja indaj virinoj ne tolerus premon, kaj ĉifonulinoj simple baldaŭ tedas. Aŭ eble li ĝis nun

memoras min... sed tiu memfiero malpermesas al li diri rekte, eĉ al si mem...

Kaj jen Johano. Verŝajne neniu ino restus trankvila apud li. Profunde nigraj okuloj, velura voĉo... lam li diris: "Pri mi cirkulas diversaj malicaj onidiroj: kvazaŭ mi havas multajn infanojn disjetitajn tra la tuta mondo... Do, mi ne volas ke oni mensoge klaĉu pri mi, mi preferas diri veron... (retorika paŭzo) Mi havas kvin infanojn de kvar virinoj." Nu, mi respondis samtone: "Mi naskas po unu infano de ĉiu viro, kiun mi amas." Jen tia paro ni iĝis, ambaŭ floroj de samaj valoroj. Ne tuj mi lin elektis, hezitis inter li kaj Andreo. Tamen, min ravis, ke Johano plu subtenas varmajn rilatojn kun ĉiuj siaj virinoj kaj gefiloj. Serioza kaj zorgema li estas, ne ventkapulo. Kredu aŭ ne, ni iĝis feliĉaj. Certe li iam-tiam plezurigis aliajn virinojn – do kio? Mi preferis ne demandi maldiskrete. Ja nin kunigis ne sole lito. Io plej subtila, ne klarigebla per vortoj... Li nenion trompis, ankaŭ ne min. Kaj mi komprenis: li, tiom bona, ja meritas amon ne nur mian. Tamen ja li konstante revenas al mi, restas kun mi... Fakte, se li kaj ŝi kuniĝas libervole, kaj se rezulte ne aperas nedezirata gravediĝo kaj ne transdoniĝas iu aĉa malsano – do seksumado ĉiam estas bono. Kaj ne gravas, kio estas skribita en iliaj dokumentoj. Al li kaj al ŝi bonas, kaj iun alian tio ne tuŝas. La tuta kvanto da bono en la mondo pliiĝas. Tiurilate mi kun Johano ĉiam samopiniis, samkiel kun mia karmemora Petro. Gravus zorgi pri la kunulo, ĉiam fari bonon por li. Kaj sincere ĝoji kaj ĝui la kunecon – ĉiun tagon, ĉiun horon... le mi legis – el virinoj, kiuj mem opinias sian familian vivon feliĉa, duono havas intimajn rilatojn flanke... Nature, se la edzo ne pretas percepti tion – do nenion diru al li, nek al iu ajn alia. Sed ja al mi bonŝancis pri la edzo...

Certe ne ĉio estis ideale glata, iam-tiam ni interkverelis, kiel ĉiuj geedzoj. Kaj foje post skandaleto kun Johano, mi iris al Andreo. Malgraŭ pasintaj jaroj, malgraŭ ĉio, en li restis sentoj al mi. Kaj li estis feliĉa tiun vesperon...

Por semajnfinoj mi kutime lasis la filinon iri al ŝia parto, Georgo. Avertante: "Se tie oni babilos pri mi aĉaĵojn – ne aŭskultu!" Jam sepjara, ŝi bone komprenis. Infanoj estas tre sagacaj, multe pli ol ŝajnas. Nur kun malpli da vivosperto, sed tio provizoras. Do indas paroli kun ili samkiel kun plenaĝuloj. Se ili ion ne komprenos – do redemandos, eble ne tuj...

Tamen, prave diris mia ŝatata poetino: "Prefere ne tro rigardi retro". Agrablas rememori amitajn kaj amatajn virojn, sed indas vivi nun kaj ĉi tie... La sama



poetino diris: “Rapide pasis la temp”. Mi feliĉas. La filino jam dudekjaras. Certe ankaŭ ŝi volis elekti por si la plej indan viron. Do ŝi atentis kelkajn, poste intime amikiĝis kun du. Ŝi ĉiam sinceris, do ĉiu el tiuj viroj sciis, ke ŝi amikas (kaj amoras) ne nur kun li. Sergeo konstante admonis, postulis, ke ŝi estu nur kun li. Kaj Alekseo akceptis ŝin tia kia ŝi estas. Do nature ŝi edziniĝis al Alekseo. Mi ĝojas pro ŝia elekto – kvankam mi eĉ ne dubis, ke ŝi elektos lin. Estu ili feliĉaj!...

Kaj vi, se vidas ion, kio ne eniĝas viajn moralajn ŝablonojn – ne juĝu. Precipe se neniu el ni plendas kaj ĉiuj kontentas. La vivo estas pli varia ol niaj imagoj pri

ĝi...

Valentin Melnikov

Belartaj Konkursoj 2018, branĉo TEATRAĴO,
subbranĉo MONOLOGO KAJ SKEĈO
Honora Mencio

Publikigita kun la permeso de la aŭtoro

Fonto: <http://verkoj.com/verkistoj/valentin-melnikov/ne-jugu/>

EKRA2021 - Poezio - Revulo

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad

BARDO EN PRINTEMPO

La korpon ŝtofo lasos
Por kisoj sunaj, flamaj,
La koron lasos spleno,
Li plenos je jubilo.

Tra gelo l' bardo pasos
Al tagoj varmaj, amaj,
Aromo kaj poleno
Lin kovros en aprilo.

La korpon lasos ŝtofo
Por kisoj flamaj, sunaj,
La koron spleno lasos,
Li plenos je amoro.

Alvenos koren strofo
Pri sentoj liaj junaj,
Glacion li frakasos,
Glacion de angoro.

MALFERMETITA ANIMO

Mi vian koron malfermetis
Kaj mian koron lum' bonkora
Ekbanis. Vintre mi impetis
El splen' al vivo ĝojkolora.
Mi venis ĝojen ĵus surprize.
Nun super mia kapo lumas
Ĉiela arko ĝojirize.
Sub sun' mi verse kolombumas

SOS

En la koro brulis flamo,
Mi al mondo kriis, SOS
Kaj estingis flamon amo
Homa amo kiel ros'.
Ĵus finiĝis tiu dramo,
L vivo verdas kiel ŝos'.

OLEG TEMELKOV –

RIGARDO AL LA MONDO

1.
Memoro pri danc'
kaj eĥo de muziko –
kara pasintec'.

2.
Oldul' kun bovoj –
“oro” en la veturil'.
Rikoltsezono.

3.
Printempaj sonoj –
cikoni' en la nesto.
Blankas la domo.

4.
Solaj boatoj
ĉe l' bordo. Trista maro.
Aŭtuno venas.

5.
Rokoj ĉe l' bordo –
gardistoj de l' vilaĝo.
La ondoj kantas.

6.
Papavoj en la
okuloj de l' somero!
Nedaŭra belec'.

7.
Kaŝitaj domoj -
rokoj ilin defendas.
Noktaj eksonoj.

8.
Rozoj malgajas
pri amantaj okuloj.
Falas folioj...

9.
Sola preĝejo –
sonorilo silentas.
Neĝo survoje.

10.

Solaj domoj en
senpopola vilaĝo.
Nek kanto, nek ĝem'.

11.
Juna amparo
ĉe la fajro. Am' brulas
kaj en la koroj.

12.
Printempa buked'-
heliantoj en vazo.
La suno tristas...

13.
Memor' el Balĉik
kun vojet' al la maro.
Somera invit'.

14.
Abocolibro
en la infanaj manoj.
La mond' ekkantas.

Revulo

poezio de **Nikolaj Neĉaev** el Rusio

Dua premio pri poezio

Viro, kiu ne havis tempon

Li estis kvardekjara iom kalviĝanta, bonhumora viro. Li neniam enuiĝis, ĉar la laboro plenumis lian tutan vivon. Li ofte malfruvespere alvenis hejmen kun multaj laboraĵoj. La aktujo ĉiam estis plenplena de diversaj dokumentoj. Ankaŭ hejme li laboris. Apenaŭ li hejmeniĝis, manĝis ion kaj li tuj kuregis al la skribotablo por labori.

Li havis nek edzinon, nek amikinojn. La laboro forrabis lian libertempon. Li ne trovis eĉ unu horetan por amuziĝi.

Kiam li estis pli juna, ankoraŭ liaj amikoj proponis al li komune „diboĉadi” en iu bonetosa diskoteko, kie facilanimaj knabinoj emas pasigi brilan nokton kun iu ajn.

Sed li neniam iris kun siaj amikoj. Li nur ridis kaj diris:

- Bonan amuzon, knaboj!

Kelkfoje tio ĉi ripetigis kaj fine la amikoj jam ne volis, ke li „diboĉadu” kun ili.

Li restis sola, sed li tiel fartis bone. Nur la laboro kaj laboro. Tio vivigis lin. Li sidis super la blankaj dokumentoj. Li legis, kalkulis kaj revadis. Liaj ĉeĝoj estis tre kontentaj pro lia laborkapablo. Baldaŭ li estis altrangigita kaj li ricevis pli multe da salajro.

Oni pensus, ke nun jam li ekripozus. Ja, li atingis

verkis Apáti Kovács Béla el Hungario

altan rangon. Sed ne. Li laboris eĉ pli intense ne indulgante sian korpon.

Kion li deziris atingi? Efektive ankaŭ li mem ne sciis tion. Eble li volis pruvi nur por si mem.

Li laboris de mateno ĝis malfrua nokto. Tiel li fartis bone. Lia vivocelo estis la laboro, aranĝi, prizorgi la aferojn de fremdaj homoj.

Ankaŭ en la oficejo li ne havis geamikojn. La kolegoj por li estis nur simpluloj, kiuj ne tro interesis lin.

Li ankoraŭ ne estis maljuna, tamen malgraŭ tio li ŝajnis oldulo. Subite li maldikiĝis. Sed ankaŭ tio ne ĝenis lin. Neniam li enrigardis spegulon. Vere kelkaj kolegoj interflustris malantaŭ li:

- Petro estas grave malsana. Li devus iri al kuracisto.

Vane ili proponis tion al li. Li ne aŭskultis ilin. Li laboris plu kaj plu senripoze.

En iu tago kiam la purigistino eniris la kontoron, lin ŝi trovis kapon kuŝigante sur la skribotablon, kvazaŭ li estintus dormanta. Sed li ne dormis. Li mortis. Li fordormis por ĉiam sciante nenion pri la mondo.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario
(11/03/1953 - 02/08/2020)



Kataj Historioj

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

7. INVITO

Nia amiko Hori, nun sendas inviton, ke ni partoprenu la legadon de interesaj esperantaj libroj pere de Esperanto-Sumoo. Kion vi diros? Mi – jes, mi partoprenos kaj legos!



8. KUN LIBRO ENMANE

Nia konata Kato kun libro enmane dum la meznokto. La horloĝo avertas:

- Delonge estas tempo vi dormi,

ĉesu legi!

La kato respondas:


- Ne rapidu tiom! Ankoraŭ malmulte mi legos! La libro estas tre interesa!



9. JE ĈEĤA PONTO

Bela kato sur fama ĉeĥa ponto. Ĝi estas malkontenta kaj pensas: "Mi nun estas sola sub la ĉielo... Kion mi faros se estus danĝero? Kiu helpos al mi? Kien mi iru?"


- Ne timu, kato, la bonaj estaĵoj neniam finas! – flustras la steloj.



(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario,

la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio



Paŭlĉjo havis azenon. Foje li vagadis en densega arbarego kun sia azeno kaj renkontis nanon. La nano dormis sub la arbusto kaj la azeno hazarde paŝis sur la pinton de lia ĉapo. Ha, la nano fariĝis furiozega! Li eksaltis kaj riproĉis al Paŭlĉjo.

- Ĉu vi ne povas pli atente gardi vian azenon? – kriis li furioze.

- Kaputiĝis mia ĉapo, rigardu ĝin, kiel malbelega ĝi fariĝis!

Paŭlĉjo rigardis la ĉapeton, ĝi vere dise – mise ŝiriĝis. Sed nun kion fari? Tial, li fierege respondis jene:

- Ĉu vi ne povas pli atente gardi vian ĉapon? La azeno estas nur azeno, mi ne povas atentigi anstataŭ ĝi.

La nano fariĝis eĉ pli kolera.

- Bone – diris li. – Tiam, mi instruos ĝin. Mi punos vin per tio, ke via azeno ripetu ĉiam, kion vi diras!

Paŭlĉjo ridis.

- Nu, ja tio ne estas granda malbono, tion mi eltenos.

Kiam li tion eldiris, la nano jam nenie troviĝis. Li volis foriri, sed la azeno ne moviĝis. Li diris al la azeno:

- Hot! Azenido! Sed tiam ankaŭ la azeno rediris:

- Hot azenido! Diable, tiel ne estos bone! – pensis Paŭlĉjo. Tiu nano plene superruzis min! Kiam li jam dum unu horo baraktis kun la azeno, li fariĝis kolerega kaj komencis batadi la povran beston.

Sed tiu tre ekkoleris kaj tiel piedbatis Paŭlĉjon je ripoj per hufoj, ke li enfalis en marĉeton. Tie li ekkriis je timo:

- Helpu! Helpu!

Tiam ankaŭ la azeno tuj komencis:

- Helpu! Helpu!

Ĝuste tiam tie vagadis arbohakistoj, kiuj helpis Paŭlĉjon eliri el la marĉeto. Ili demandis, kiu estas la alia homo, kiu kriis por helpo?

- Mia azeno – diris Paŭlĉjo kaj li mizere palpatis

sian talion.

Sed tion ne kredis la arbohakistoj, sed diris, kiu povas tiel mensogi, tiun oni devas konduki antaŭ la reĝon, por ke li punu la mensogulon. Tiel okazis. Ili kondukis lin antaŭ reĝon, kiu juĝis jene: oni devas fermi Paŭlĉjon en karceron.

La reĝo demandis la junulon, kio estas lia lasta deziro, ĉar tion li ankoraŭ plenumos. Paŭlĉjo petis nur tion, ke li povu adiaŭi sian azenon. Oni tuj kondukis al li la azenon. Paŭlĉjo surgenuiĝis antaŭ la reĝo kaj ekparolis:

- Majesta reĝa moŝto, indulgu je mia orfa kapo, mi estas senkulpa!

La azeno ripetis la petegon.

La reĝo ekridis kaj tuj liberigis Paŭlĉjon kaj dungis lin kaj lian azenon, kiel bufonon.

Esperantigis: sinjorino **Ilona Fedor** (El Brilantaj Steloj I)

Fonto: **Nordhungaria Informo** (Februaro 2006)

Marta Ĝojo

Galanto

Marto kun vento
alvenis Printempo
post longa vojo.
Kuradis, rigardis,
sen kaŝi sian ĝojon.
Pri kio ĝi miris?
Galant' kapon klinas
kaj al io sopiras.
Flavan krokuson
jen la suno kisas.
Bunta primolo
brilas libervole.

Neĝon ĝi ekboris
kaj ekspiris mire:
- La vintro foriras!...
Ĝi min amis –
nun mi ĝin ornamos!
La tenera floro,
pura, kiel neĝo,
malgraŭ l' frosto regos.

Al la floro blanka
sunaj kisoj mankas.

Ĝojigis la koron
al Marto la floroj.



verkis kaj sendis
Elena Popova
el Bulgario



Blua

Dum la bluaj krepuskoj
Tremas bluaj folioj
Svarme lunen jen flugas
Bluaj noktpapilioj.

Min ĉirkaŭas la nokto,
Ĝia blua nescio,
Flugas mi en senlimon
Kvazaŭ blupapilio.



verkis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius
el Litovio

Urbo: Da Nang 25 ĝis 28 aprilo 2019.
(Mia Vojaĝo de la 24-a de aprilo ĝis la 1-a de majo)

Enkonduko al Vjetnamio

Vjetnamio, estas dekobla grandeco de Tajvano; kvarobla loĝantaro de Tajvano. Ĝi estis koloniita de Francio dum preskaŭ cent jaroj ekde la mezo de la 19-a jarcento. Ĝi estas vasalo de Ĉinio ekde antikvaj tempoj, sed ekzistas Ĉampa kulturo en la centra kaj suda partoj de la lando. Homa impresio de Vjetnamio en la pasinteco de Tajvano estis plejparte de la novaj loĝantoj (eksterlandaj edzinoj). Kia estos nun en Vjetnamio?

Vjetnamio gastigiĝis la Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo en la jaro 2012, kaj la esperantistoj de la lando estas tre aktivaj (la anocistino de la Internacia Verpero en 2017 UK estas la juna vjetnama esperantisto), tajvanaj Esperantistoj devus kompreni kaj lerni el la landa movado, kiel Esperanto funkcias. Tial, eĉ ankaŭ miaj koreaj geamikoj iros, do mi iris sur la vojon al Vjetnamio kun mia granda ruĝa valizo (kun 48 Formoza Folioj, kelkaj ananaskukoj kaj sekigitaj ananasoj, tri libroj "Apud Tajvanastrataj domoj", kaj poŝkomputilo, entute 27,3 KG)

La urbo de la kongreso - enkonduko al Da Nang

Da Nang estas la kvara plej granda urbo en Vjetnamio (post Ho-Ĉi-Min-urbo, Hanojo kaj Haiphong). La kongresejo situas en hotelo apud la maro. Estas granda strando apud la maro. Oni povas simple preni bantukon, kaj post promenado de kelkaj minutoj naĝi en la maro.

De Tajvano al Da Nang, oni devas preni internacian flugon al Flughaveno Tan Son Nhat en Ho Chi Minh-urbo, kaj poste translokiĝi al la enlanda flughaveno al Da Nang. Feliĉe, la enlanda flughaveno estas proksime, kaj mi povis trovi la vojon kun mia granda pakaĵo. Dum la revena vojaĝo, vi devas unue preni la enlandan vojon kaj poste translokiĝi al la internacia vojo. Atentu speciale, estas facile erari.

Impresoj de Vjetnamio

La hotelo, en kiu mi loĝis, estis tri steloj-hotelo kun malmultekosta prezo de 25 eŭroj nokte. Post la kongreso, estis la Tago de Reunuiĝo (30-a de aprilo) kaj la ferio de Tago de Laboristo, la 1-a de majo en Vjetnamio. Multaj familioj ekskursis kun siaj infanoj. Ĉie vidiĝas junaj virinoj kun beboj, kaj la socio estas plenvigleca. Kvankam la stratoj estas tre bruaj kaj ĉie estas sonoj de aŭto-parolantoj, la homoj estas tre afablaj, kaj bonaj. Oni povas lasi la dorsosakon sur la

plaĝon. Kiam oni transiras la straton, oni rigardas la rajdanton, kaj neniu intence batos homojn. La tuta socia etoso tre similas al kiam la ekonomio de Tajvano estis ekflugigota antaŭ tridek jaroj.

La plej multaj el la taksioj en Vjetnamio estas tiel, kiel UBER, kaj ekzistas ankaŭ motorciklaj taksioj. Mi mendis KKDAY-kolektan taksion de Da Nang Flughaveno por ŝpari la problemon trovi mian vojon.

Vjetnamio estas koloniigita de Francujo dum preskaŭ cent jaroj, do ĝia kafo estas bongusta, kaj estas bongusta franca pano ĉie sur la strato, kiel estas unika en Azio.

Kongrensa programo

Raporto pri Azia movado de Esperanto

Helpate de s-ro Reza li preparis informo pri la Esperanto-movado en Tajvano. Reprezentantoj inkluzive el Japanio, Sud-Koreio, Ĉinio, Mongolio, Filipinoj, Indonezio, Tajlando kaj aliaj landoj. Japana Esperanto-paro faris tre zorge demandojn, kio estis tre ekscita movo.

Portreto de Zamenhof

Ĉi-foje mi finfine renkontis HO Song (la edzo de Jesa), mi nur antaŭe aŭdis pri ĉi tiu grava persono. Li ankaŭ kontribuis sian profesion por gvidi klason pri pentrado de la portreto de Zamenhof. Ĉiuj geesperantistoj pentris siajn proprajn Zamenhofo. Esperantiso transformiĝas en artiston, kio estas tre interesa.

Prezentado de nova libro: Kanĵi-vortaro por lernantoj (Esperanta Eldono)

Jack Halpern estas germano loĝanta en Japanio kaj estas poligloto, kiu estas fama konata en Japanio, li eldonis novan libron pri la studo de ĉinaj ideografioj, kiu estas tre utila por esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la kanĵi. Homoj, kiuj estas ĉina-rilataj landoj, inkluzive japanoj, koreoj, vjetnamoj..., povas uzi ĉi libron por lerni "kanĵi"n.

Ekskursoj

Konferenca ekskurso

Sabate, la 27-a de aprilo, la trian tagon de la kongreso, laŭ kutimo de kongreso okazis ekskurso. Ni plantis 5 arbojn en la Junulara Parko, simbolante amikecon, pacon kaj tutmondan kunlaboron sur 5 kontinentoj. Post la renkontiĝo, ni iris viziti la Muzeon Cham en la urbo. Ni rigardis multajn statuojn pri



hinduaj dioj, kaj ankaŭ mi lernis pli pri la kulturo de aliaj etnoj en Vjetnamio. Poste, mi vizitis Pagodon Linh Ung, kie troviĝas granda statuo de Bodhisatvo. Mi ĉirkaŭpaŝigis la Bodhisatvon trankvile, preĝante por la sukceso de mia doktoriĝo kaj la bondeziroj de miaj Esperanto-amikoj.

Ba Na Monteto

Mi atingis kongresejon antaŭ unu tago de kongresa komenctago en la 24-an de aprilo. Laŭ mia plano, mi esperis povi viziti la My Son sanktejon (UNESKO-heredaĵo). Sed, bedaŭrinde la turismagento postulis almenaŭ du homojn por aranĝi la vojaĝon. Do mi devis nuligi la planon, ĉar krom mi, neniu povis iri. Anstataŭ tio mi partoprenis ekskurson al Ba Na Monteto en la venonta tago.

Pri Ba Na Monteto oni povas diri, ke estas Disney aŭ Universal Studios de Vjetnamio. Estas eŭropaj kasteloj, belaj okcidentstilaj ĝardenoj, ora ponto de budhaj manoj, ktp. Oni diras, ke ĝi estis franca feriejo.

La ekskurson gvidis du volontuloj, sed komence, pro manko de ĉiĉerona sperto, grupo da partoprenoj perdiĝis. Post kiam ili estis retrovitaj, volontuloj kunvenis en ĉiu loko je kontrola tempo. Post nombri la nombron de homoj, ili diris, "sufiĉe". Post kelkaj fojoj, la korea instruisto, kiu instruis Esperanton en Zaozhuang, Ĉinio, proponis, ke uzante "ĝuste" estus pli bona. Ĉi-foje instruistoj de Zaozhuang Universitato, kiuj devenis de Pollando, Japanujo kaj Koreio partoprenis. Cetere, unuafoje, ĉinaj esperantistoj partoprenis la ekskurson. Tio signifas, ke Esperanto-movado en Ĉinio prosperas.

Nokta ekskurso en malnovan urbon Hoi An

Hoi An estas antikva urbo registrita kiel Unesko Monda Heredaĵo. En antikvaj tempoj, ĉar la riveroj trairis ĝin, ĝi estis konektita al la maro. Pro tio ĝi fariĝis komerca urbo konservante la aspekton de interlandaj kulturoj. Mi aŭdis, ke Hoi An nokte estas malsama de sia taga aspekto. Pro tio, do post la kongreso mi prenis taksion al Hoi An kun iu esperantisto. Tie, la domoj estis konstruitaj apud la rivero. La urbo de akvo estis bela! Rajdante nemotoran boaton en somera nokto, rigardante la ruĝajn aŭ diverskolorajn lanternojn reflektitajn sur la akvo, kun la malvarmeta venteto blovanta sur mia vizaĝo, estis nur la sono de la akvo fluanta kaj la boatisto tenanta la padelon. La pejzaĝo ebrigis homojn tiel, kiel la rakonto Lanting Xu! (fama kaligrafio verkita de la orienta Jin-kaligrafo Wang Xizhi ĉe Lantinghui.)

Hue Imperia Urbo

Post la kongreso mi partoprenis dutagan ekskurson. Krom vjetnama esperantisto Ha, estis

ankaŭ vjetnama ĉiĉeronino. Partoprenis entute dek geesperantistoj el Tajvano, Japanujo, Koreujo, kaj Hispanujo: el Koreujo estis busaninoj --- Lumi kaj aliaj 3 virinoj kaj la knabino Sana, s-ro Sawaya kaj la geedzoj Kita el Japanio, kaj Petra el Hispanujo.

Hue estis la ĉefurbo de Vjetnamio en malnovaj tempoj, kaj ĝi estis ankoraŭ vasalo de Ĉinio en tiu tempo, do la palaco imitis el la ĉinaj. La tombejo de reĝo Khai Dinh eĉ konservas la plej tranĉajn fragmentitajn ceramikajn ornamadojn. La Ming Mang Maŭzoleo daŭrigas la ĉinan konstrustilon kun centra akso kaj havas belegan ĝardenon. Vere mirigas min, ke mi povas vidi ĉinan kulturon eksterlande. Estas la unua fojo, ke mi vizitas la lokon, kiu krom Japanujo aŭ Koreujo estas ĉin-rilata kulturo. Antaŭe mi nur legis en historiaj libroj. Precipe iuj tekstoj sur la tripeđa ferio kaj iuj oficialaj dokumentoj estas fakte en normala ĉina lingvo, kion nur tajvananoj povas kompreni!

Resumo

La Azia kaj Oceania Kongreso de Esperanto havas malpli da partoprenantoj ol UK (281 personoj el 22 landoj), do ĝia programo estis malgranda, kaj la partoprenantoj povis vojaĝi pli profunde en la landon. Samtempe ĝi povas ankaŭ malfermi fenestron por lokaj esperantistoj por konekti kun la mondo. Ĉi-foje AOK havis kelkajn pli maljunajn vjetnamajn esperantistojn (en interkona vespero), Usui (Hiroyuki Usui) estis invitita al Da Nang du monatojn antaŭe por instrui kelkajn universitatajn volontulojn Esperanton, Da Nang Esperanto-Asocio denove reaktivos post AOK. Tiel estas bonaj influoj, kiujn la kongreso alportis al la loka regiono. Aliflanke mi vidis ankaŭ la entuziasmon de esperantistoj. La unuan nokton mi vespermanĝis kun esperantaj geedzoj, kaj ĉe la sama tablo estis alia vjetnama universitata studentino, kiu studas la korean. Montriĝis, ke la geedzoj renkontis ŝin en Hanojo. Ili subtenis sin la enlanda flugbileto por partopreni en AOK kaj lerni Esperanton. En la lasta tago de la kongreso, la pola profesoro (li kelkaj fojoj diris, ke nepre vizitos Pingtung) donacis ĉapelon, esperante aŭkciis ĝin por subteni la Vjetnaman Esperanto-Asociation. La ĉapelo tuj estis aĉetita de s-ro HO el Korujo. La ĉapelo certe estis la plej afabla ĉapelo, kiu montris la mirindajn sentojn de esperantujo, kiuj pretas helpi unu la alian.

La Azia kaj Oceania Esperanto-Kongreso 2022 okazos en Busan, Kreujo de la 3-a ĝis la 6-a de novembro. Kongresa Temo: "Novan vojon por la Esperanto-Movado post Kronvirusa Krizo".

Ni kune iru!

verkis kaj sendis **Liru CHEN** el Tajvano

Kimrio, volis konektiĝi al la ceremonio surete, sed ĉi tio ne estis akceptita de la premia komitato. Kvankam premioj kiel Grammy kaj Ora Globo de la jaro estis organizitaj rete, la Oscar-komisiono deziris fizikan partoprenon, kiel eble plej multe. Studioj estis starigitaj en Parizo kaj Londono paralele al tiu de Los Angeles. Sed Hopkins iris al neniu de tiuj, citante sian aĝon. Anstataŭe, li faris videaĵon la tagon post la premia-nokto, en kiu li gajnis la premion, kaj kunhavigis ĝin pere de sia socia amaskomunikila retpaĝo. Li faris dankparoladon kaj parolis omaĝe al Boseman, kiu mortis en la aĝo de 44 kaj estis inter la kandidatoj por la premio en kategorio la plej bona aktoro. Hopkins kunhavigis ankaŭ alian videaĵon pere de sia socia amaskomunikila retpaĝo en la sama tago. Ĉi-foje, la veterana aktoro estis ĉe la tombo de sia patro, Robert Hopkins. Li legis poemon de la kimra poeto Dylan Thomas "Do not go gentle into that good night" (Ne iru milde en tiun bonan nokton) dum li metis mesaĝon en sia kunhavigo: "Richard Hopkins, mia kara patro dormas en eterna paco".

La aktoro ankaŭ havas reĝisorajn laborojn. En 1990 li reĝisoris la filmon pri la plej fama poeto de Kimrio: "Dylan Thomas: Return Journey" (Dylan Thomas, revena vojaĝo). Ĉi tiu estis lia unua reĝisorado, kiu aperis sur la ekranoj. En 1996, li reĝisoris la filmon "August" (aŭgusto), kiu estis ia kimra adaptado de la verko de Ĉeĥov "Onklo Vanja". Krome, eksperimenta dramo nomita "Slipstream", kiu estis lia unue verkita skripto kaj ankaŭ faris la muzikan komponaĵon kaj reĝisoradon de ĝi mem. La filmo estis unue montrita ĉe la Sundance filmfestivalo en 2007.

La aktoro komponas, ludas pianon, pentras, kaj ankaŭ estas konata pro siaj filantropiaj agoj. Li estas la subtenanto de "Greenpeace", kaj ankaŭ kontribuis al la renovigo de parto de sia gimnazio en Cardiff: "Royal Welsh College", lernejo pri musiko kaj dramo, pere de 2,3 miloj da pundoj. Tiu renovigita parto estis nomita "Centro de Anthony Hopkins" kaj estis inaŭgurita en 1999.

Kiel li diris, li daŭre vivis plenplene kaj ankoraŭ vivas tiel. Mi ne pensas, ke en sia infaneco li antaŭvidis, ke li fariĝus tiom sukcesa kaj fama aktoro. Li diras ion, tian pri sia infanaĝo:

"Mi estis malbona lernanto. Tial oni multe incitis min kaj tio kaŭzis min havi malplivalorecan komplekson. Kreskante, mi estis konvinkita, ke mi estis idioto."

Fakte, ĉiuj tajdoj, infanaj psikaj traŭmatoj, kaj kompleksoj troviĝas en la feĉo de bona aktoro. Ni nomas aktoron tian homon, kiu transformas ĉi tiujn 'materialojn', kijun la plej multaj homoj havas, en arton, en majstran kopion de vivo kaj karaktero. Kun sia

mezalteco, raŭka voĉo kaj iomete mallevita maldekstra okulo, Hopkins transformis ordinaran aspekton en eksterordinaran imponan aktoron. Tio devas esti la magio de ludarto!


Kompreneble, nur talento donita de Dio ne sufiĉas. La aktoro estas konata pro sia zorgema laboro pri siaj roloj en la kinejo. En la filmo "Amistad", estas dirite, ke li deklamis sian longan paroladon en la kortega sceno unufoje parkere kaj ke tiu sceno estis filmite en unu sola fojo. Malantaŭ lia laborego kuŝas la sekva filozofio:

"Mi estas el Kimrio. Kimra socio estas forta kaj batalema ĉar ĝi estas socio, kiu konstante militis. En Kimrio, homoj ne perdas tempon kulpigante sin pri siaj propraj problemoj. Ili ne hezitas eliri kaj batali. Tia estas ankaŭ mia filozofio. Vi devas esti forta kaj batalema. Kompreneble, ĉi tio ne signifas esti malmola kaj kruela. Vivo estas mallonga kaj do estas tuta tempoperdo por homoj vivi kun kompatemo pri si mem."

En la gazetaro, estas malsamaj artikoloj pri la kredoj de la aktoro. Eble tio estas ĉar li havis malsamajn pensojn en malsamaj tempoj de sia vivo kaj faris deklarojn laŭe. Ludante la rolon de ekzorcistpastro en la filmo "The Rite" en 2011, Hopkins diris en intervjuo, "Foje mi vere ne scias ĉu mi kredas je Dio, je Patro Kristnasko, aŭ je feoj." Aliflanke, en ĉi tiu intervjuo, Anthony Hopkins deklaris, ke li havis kredon je Dio ekde multaj jaroj.

Responde al a demando de Larry King pri kio ni estas post kiam ni mortos li diris: "Mi ne scias ĉu mi kredas je Dio. Mi ne scias, ĉu tio, kion mi kredas, estas tio, pri kio homoj parolas dum jarcentoj. Sed mi pensas, ke tiu afero estas ene de ni. Kaj foje kiam mi vere volis ion, mirindaj aferoj okazis en mia vivo. Sed mi ne estas kredanto, mi estas agnostikulo. Mi ne pensas, ke ekzistas ia pli alta potenco, kiu helpas min. Sed mi vere kredas, ke estas forto ene de ni, kiu respondas al ni."

Hopkins ludis iun scenon kun Morgan Freeman en la filmo



“Amistad”, en kiu, mi ne povas forgesi lian tre simplan geston: Li prenis florpoton de unu loko kaj metis ĝin en alian dum li parolis pri io. Li faris tion tiel nature, ke mia admiro pri tio ankoraŭ estas en mia memoro. En la tre bela kaj simpla filmo “84 Charing Cross Road” li ludis edziĝintan posedanton de librovendejo, kiu korespondadis kun usona verkistino, kiun li neniam antaŭe vidis. En unu sceno de ĉi tiu filmo, li ekvidas ĉarman aktorinon enirantan la butikon kaj senditan de lia korespondantino por lasi donacon al li sekrete! En sia rigardo al la virino, li tiel majstre gestas sian

konfuziĝon pri la du virinoj, li ludas sian penson pri tio, kio li pensas ke ŝi estas lia korespondantino! Tiel iĝas bona aktoro kaj tiel iĝas bona filmo.

Post ĉi tiu artikolo, mi fervore spektos la filmojn de Hopkins, kiujn mi ankoraŭ ne spektis.

Konuralp Sunal

22-a de februaro 2022

Buyuükada insulo, İstanbul – Turkio

32>>

„Kiel vi opinias?“ demandis la Malgranda Sorĉistino.

„Kiel mi opiniu! Se mi estus vi kaj povus sorĉi, mi tutcerte ne bezonus tizanon por varmigi min! Dekomence mi nepre evitus ĝin!“

„Sed mi ja faris ĉion, kion mi povis fari!“ diris la Malgranda Sorĉistino. „Mi surmetis du parojn da gantoj, la vintrobotojn, la lanan kaptukon kaj sep jupojn...“

„Aĥ ĉesu!“ kriis Abrakso. „Mi scias rimedon kontraŭ la frosto, kiu estas pli bona ol sep jupoj!“

„Pli bona ol sep jupoj?“

„Multe pli bona! Same vere, kiel veras ke mi estas korvo kaj nomiĝas Abrakso!“

La Malgranda Sorĉistino ankoraŭ ne komprenis lin. „Diru al mi“, ŝi petis lin, „kion mi preterlasis laŭ via opinio. Sed vi devas diri tion pli klare kaj ne parolu ĉiam per enigmoj.“

„Ĉu mi vere parolas per enigmoj?“ demandis Abrakso. – „La afero estas tute klara, kiel akvo! Se vi havas kapablon forigi la malvarmon de la maronvendisto, kial do, mia kara, vi ne povas fari la samon por vi?“

„Aĥ!“ kriis la Malgranda Sorĉistino kaj frapis sian frunton, „Tio estas ĝusta! Kiel do okazis, ke mi ne havis tiun ideon pli frue? Vi pravas! Pro kio mi ja estas sorĉistino?“

„Ĝuste, ĝuste“, konsentis Abrakso. „Kelkfoje vi ŝajne tute forgesas tion. Sed bone, ke vi havas iun, kiu de tempo al tempo memorigas vin pri tio!“

Kaj la Malgranda Sorĉistino fervore kapjesis pri tiuj vortoj kaj diris:

„Jes, jes, vi vere estas la plej saĝa korvo, kiu iam ajn eloviĝis! Memkompreneble mi tuj sekvos vian konsilon. Kaj se vi konsentas, mi volas helpi ankaŭ vin per mia sorĉa diraĵo kontraŭ malvarmo, por ke vi estonte ne plu restu hejme, kiam mi elrajdos.“

„Konsentite!“ diris Abrakso, „vi foje

rajtas fari ion bonan ankaŭ al mi!“


Tiam la Malgranda Sorĉistino sorĉis sin kaj la korvon, ke ili ne plu havu malvarmon. Ekde nun ili povis promenrajdi ankaŭ en la plej akra malvarmo, sen senti froston. Ili nek bezonis dike vesti sin, nek trinki poste tizanon.

Kaj nazkataron ili ankaŭ ne ricevis, kvankam ili de tiam estis survoje preskaŭ ĉiun tagon.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova



Solvo de la krucvortenigmo



Londono vokas 1903 – 1978

- *Historio de la Londona Esperanto-Klubo – de Harry Holmes*

1944

La nova jaro komenciĝis per kunveno kiu ne aperas en la kluba programo. Sabate la 2-an de Januaro la Societo por Britaj Instruistoj de Esperanto aranĝis en la klubejo diskuton pri la temo (tradukita) „La enkonduko de Esperanto en la edukon sistemon de Britujo“, kiun malfermis S-ro R. W. Hamilton MA., M Litt., ĉefinstruisto de Hemsworth Grammar School, gimnazio en kiu oni instruas Esperanton. Li forte batalis por ke Esperanto estu inkluzivigita en la temojn por la ŝtata abiturienta ekzameno.

Por la unua fojo la pordo de nia kunvenejo Fred Tallant Hall devis esti fermita pro ŝtelado el la vestejo. Ekde tiam oni estis devigata sonorigi.

En City Literary Institute okazis debato pri la plej bona solvo de la problemo de Internacia Lingvo. Percy Wright, kiu dum multaj jaroj instruis tie esperantajn kursojn aranĝitajn de la Klubo, metis la avantaĝojn de Esperanto antaŭ, laŭdire, neesperantista aŭdantaro. La fina voĉdono estis por Esperanto 28, Basic English 0, normala angla lingvo 1, manipulita angla lingvo 9, la franca 3, interglossa 6, tute kontraŭ internacia lingvo 1, ne voĉdonis 7.

Kvankam aeratakoj estis oftaj, 30 personoj partoprenis la kluban jarkunvenon. La kluba bulteno diras (tradukita): „Oni fine devigis S-inon Nora Holmes akcepti la oficon de helpprezidanto. Multe el la laboro ŝi faris dum longa tempo“. Kvankam Nora ne volis titolon, fakte, aparte dum la milito granda parto de la ŝarĝo administris la Klubon falis sur ŝin.

La du klubaj kursoj pri Esperanto en City Literary Institute daŭris ĝis la finiĝo de la trimestro dank’ al la dediĉo de Percy Wright. Dek du lecionoj kostis 2ŝ 6p (egale al 12½ novaj pencoj). Ankaŭ estis Ĉe-metoda kurso, instruita de S-ro Osmotherly, en la klubejo.

Oni devas memori ke la Klubo respondecis pri la organizo de Esperanto en City Literary Institute. Do ĝi havis rektan intereson en la tuttaga konferenco pri Internacia Lingvo aranĝita de „New Education Fellowship“. D-ro Bodmer, la aŭtoro de „The Loom of Language“, parolis pri la historio de internaciaj lingvoj; D-ro Hatfield parolis pri „Basic English“; Prof. Lancelot

Hogben, ĝia aŭtoro, parolis pri „Interglossa“; D-ro Dutton parolis pri „Speedwords“; S-ro Jacob parolis pri Ido kaj S-ro Butler parolis pri Esperanto. D-ro Hatfield konfesis ke li ne kapablas paroli Basic English kaj diris ke li kredas ke ankaŭ S-ro Ogden kaj D-ro Richards, la kunaŭtoroj de Basic English, ne kapablas paroli ĝin. *Tamen en 1947 la Ŝtato aĉetis la kopirajton por £23 000, kredeble pro la raporto de komitato kiun Churchill starigis en 1943 por enketi pri la facileco de lernado de diversaj internaciaj lingvoj kompare kun la angla lingvo.* Kontraŭstari Basic English kaj Interglossa estis grava tasko por la Klubo.



El la libro „La malgranda Sorĉistino“

Otfried Preussler

Inter-kulturo, Maribor kaj Esperanto-Frende, Durmersheim/Rastatt, 1994 Pli bone ol sep jupoj

Kiam ĉirkaŭ malheliĝo la Malgranda Sorĉistino revenis hejmen, la korvo Abrakso tuj volis scii, kion ŝi travivis dum la surbalaila flugado. Sed la Malgranda Sorĉistino dentklakante respondis:

„T-tion mi v-volas rakonti al v-vi pli p-poste. Antaŭ ĉio mi d-devas p-prepari por mi t-teon, ĉ-ĉar mi t-tiom frostiĝis, ke mi ap-penaŭ povas p-paroli.“

„Jen vi vidas!“ grakis Abrakso, „nun la sekvoj, ĉar vi nepre volis elrajdi en tiu akra malvarmego! Sed vi ja ne sekvis mian konsilon!“

La Malgranda Sorĉistino kuiris por si grandan poton da tizano. Tiun ŝi dolĉigis per multe da sukero. Poste ŝi ŝmace sorbis tiun varmegan trinkaĵon. Tio bonfaris al ŝi, kaj baldaŭ ŝi revarmiĝis. Tiam ŝi demetis ses el la sep jupoj, formetis ŝuojn kaj ŝtrumpojn, glitis en la feltopantoflojn kaj diris:

„Ke mi mizere frostis, mi ja ne volas kontesti. Sed mi diras al vi: Tamen estis bele!“

Ŝi eksidis sur la fornbenko kaj komencis rakonti. La korvo Abrakso silente aŭskultis ŝin. Nur post la rakonto pri la maronvendisto, li interrompis ŝin kaj diris:

„Do, sciu, iom post iom mi nenion plu komprenas! Al tiu maronvendisto vi helpis per via sorĉado kontraŭ malvarmo, sed kial vi ne helpis al vi mem? Kion mi diru kiel saĝa korvo?“

>>31

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds